Mi tentis envane enlande por trovi sponsorojn, eĉ ĉe nia ministerio pri kulturo. Mi provis trovi sponsorojn ankaŭ eksterlande, ĉe UEA, FEL kaj ELNA, sed denove sensukcese. Konsiderante la libron klasikaĵo por nia enlanda movado mi insistas ke ĝi aperu denove kaj ĝuigu niajn esperantistojn ene kaj ekster Albanio.

Ĉar Gjergj Kastrioti - alinomite Skanderbeg, estis grandega militista stratego kaj homo de sia epoko kaj ĉar li kaj liaj albanaj kunbatalantoj dum 24 jaroj defendis ne nur ilian patrion sed la tutan eŭropan civilizon, akirante per tio la admiron kaj la apogon de Papoj, reĝoj kaj ordinaraj eŭropanoj, kaj precipe ĉar lia agado forte ligiĝas ankaŭ kun Italio, mi pensis alskribi vin kaj peti ke via asocio entreprenu la reeldonon kaj la disvendadon de la libro envorte. Mi esperas ke la kostoj de la libro estos kovritaj dank'al la vendado kaj estiĝos ia surpluso enkasiĝonta ĉe via klubo. Por mi, se eblus, sufiĉus modesta monsumo.

Do, karaj amikoj mi petas vin pripensi mian proponon-oferton kaj espereble decidi pozitive.

Atendante vian respondon, sugestojn, rimarkigojn, ktp mi antaŭdankas vin elkore.

Altestime,

Bardhyl Selimi

Propono al la Albana Poŝtoservo

E-Mail selimibardhyl@yahoo.com, bselimi@gmail.com

11/27/2011

Drejtorisë qëndrore të

Postës Shqiptare

Tiranë

Për dijeni

Zonjës Mirela Karapici, drejtore Marketingu

Tungjatjeta!

Zonja e zotërinj, duke ju dëshiruar shëndet dhe mbarësi në punë ju lutem kushtojni pak vëmëndje kërkesës së mëposhtëme. Faleminderit!

Vitin e ardhshëm mbushen 125 vjet (12 korrik) që nga dalja e librit të parë të Gjuhës Ndhmëse Ndërkombëtare Esperanto. Autori i saj, z. Ludëig Zamenhof ia doli që pas qindra projektsh gjuhësh artificiale me shkrim ose me gojë të na dhuronte një projekt që mbijetoi deri sot dhe është bërë funksional.

Kjo për disa arsye:

Esperanto ishte një gjuhë natyrore, me material leksikor nga gjuhët ekzistuese, ku gjysma janë pothuaj ndërkombëtare;

ajo është një gjuhë fonetike, lehtësisht e shqiptueshme;

gramatika e saj përbën një sistem mjaft të thjeshtë pa përjashtime dhe logjik, që mundëson mbi bazën e një rrenje fjalë të krijohen 30-40 fjalë të reja, gjë që bën të mundur mbajtjen mend vetëm të një sasive relativisht të kufizuar fjalësh, të themi më pak se 3000;

gjithashtu Esperanto nuk xhelozon asnjë popull os ekomb pasi nuk është krijim i tyre drejtpërdrejt, as bart kulturën e tyre;

së fundi ajo është një strukturë ndihmëse për të përvetsuar më shpejt e më qëndrueshëm gjuhët kombëtare aq të nevojshme në kushtet e marrëdhënieve të sotme ndërkombëtare.

Pra ajo nuk i zevëndëson, përkundrazi i ndihmon dhe i mbron gjuhët kombëtare, sidomos ato të popujve të vegjël

Në Shqipëri ajo ka hyrë të paktën në vitin 1907, përmes studentëve shqiptarë si vëllezërit Mark dhe Wilhelm Koliqi, Dom Lazër Shantoja, Mark Kakariqi, Cuk Simoni, Janko Pali, Çefo Fico, etj

Në vitin 1921 qeveria shqiptare (Ypi-Mitrovica) përqafoi nismën e 12 vendeve antare të ish Ligës së Kombeve dhe nënshkroi rezolucionin për futjen e Esperantos në shkollat fillore, ndonëse delegati francez vuri veton.

Esperanto vijoi të përhapet edhe gjatë kohës së monizmit, por më tepër pas vitit 1990, kur u krijua edhe shoqata kombëtare e saj, antare e Shoqatës Botërore të Esperantos (UEA) me qendër në Rotterdam (Hollandë).

Esperantistët shqiptarë janë përpjekur përmes kursesh, botimesh, propagande në shtyp ta përhapin këtë gjuhë, ndonëse me vështirësi për shkak të paragjykimeve që ngrihen zakonisht ndaj çdo gjëje të re, qoftë edhe të dobishme, njëlloj sikurse u deshën 500 vjet që të pranoheshin në Evropë numrat arabë..

Ne shprehim gatishmërinë tonë për të ngritur një kurs të shkurtër pranë jush me punonjës që dëshirojnë, pasi të zhvillojmë një bisedë paraprake me ta, në mënyrë që edhe në Postën Shqiptare të krijohet një bërthamë esperantistësh- antare e Shoqatës Botërore të postierëve esperantistë dhe e filatelistëve esperantistë.

Vërejmë që Esperanto është pranuar që në fillimet e shekullit XX nga Shërbimi Postar Ndërkombëtar.

Gjithashtu, ju vemë në dijeni se në pothuaj të gjitha vendet evropiane dhe shumë të tjerë jashtë Evropës shërbimet postare kanë emetuar seri pullash edhe me tematikë nga Esperanto, me rastin e kongreseve që zhvilloheshin nga një vend në një tjetër, me rastin e jubileve të lindjes së gjuhës në fjalë, etj.

Prandaj është në nderin dhe traditën edhe të Shërbimit Postar Shqiptar që të emetojë tani për 125-vjetorin e daljes së librit të parë për Esperanton një pullë ose seri postare. Pasi të bihet në ujdi në parim, mund të diskutohet edhe për paraqitjen e kësaj pulle, që mund të jetë portreti i Ludwig Zamenhofit dhe shënimi Esperanto- 125 vjet, mund të jetë figura e esperantistëve të parë shqiptarë, kopertina e librit të parë shkruar në original në Esperanto tuk Simonit me titull “Skanderbeg- Heroo de Albanujo” (Skënderbeu- heroi i Shqipërisë), ose ndonjë kompozim tjetër që do përzgjidhet nga ju.

Shpresojmë në mirëkuptimin tuaj

Në emër të shoqatës së mësuesve esperantistë, sekretari, Bardhyl Selimi

Shtojcë

Njoftim për shtyp i Organizatës Botërore të esperantos

Ni kaj ILEI, UEA, AIS

Komitato de ILEI

2011/11/12 ILEI Sekretario <ilei.sekretario@googlemail.com>

Al: komitatanoj, sekciestroj, reprezentantoj kaj kontaktopersonoj

Karaj kolegoj

Ni anoncas la rezulton de la reta voĉdono de la komitato finighinta en la 31a de oktbro, 2011

=====

Rezulto de la reta voĉdono de la komitato finighinta en la 31a de oktobro, 2011.

Validaj voĉoj ricevitaj: 36

1.1 protokolo kopenhaga, sesio 1.	JES 34	NE 0	SINDETENO 2
1.2 protokolo kopenhaga, sesio 2.	JES 34	NE 0	SINDETENO 2
1.3 protokolo kopenhaga, sesio 3	JES 33	NE 0	SINDETENO 3
2.1 statutmodifo che 7.2.7	JES 35	NE 0	SINDETENO 1
2.2 statutmodifo che 7.2.8	JES 34	NE 0	SINDETENO 2

En kelkaj landoj voĉdonis malpli ol la nombro da validaj komitatanoj.

Ne atingis nin voĉoj el la sekvaj landoj kun sekcioj: Albanio, Australio, Benino, Brazilo, Burundo, Katalunio, Norvegio.

Alvenis du pliaj voĉoj post la limdato: ambau esprimis kvin-foje JES.

Deklaras, la 12-an de novembro:

Trezoro(Huang Yinbao),sekretario de ILEI kaj Stefan MacGill ,prezidanto de ILEI

Noto: Ne estas vere ke Albanio ne respondis. Mi fakte dufoje sendis informaĵon.

Shaban Hasani

Altiĝo de membrokotizo al ILEI

From: Stefan MacGill <stefan.macgill@gmail.com>

Sent: Friday, November 25, 2011 2:23 PM

Subject: [ilei-sekciestroj+reprezentantoj] Membrighoj por 2012

Karaj sekciestroj!

Vershajne mi scias, ke la komitato akceptis modestan altigon de niaj membro-kotizoj ekde 2012. Sed ghis la jarfino ni akceptas kotizojn lau la nunaj prezoj. Tio validas ankaŭ por abonoj al Juna amiko. Ni fidas ke vi jam arigas kotizojn por komplezi al viaj membroj. Jen teksto, kiu aperos en IPR4 por memorigi pri tio. Bv uzi ghin por komenci / daurigi la revarban kampanjon. Eblas aperigi ghin en revuoj, ankaŭ por altiri membrighojn de novaj membroj, ankaŭ inter ne-instruistoj. Por daurigi la agadan impeton de la lastaj jaroj, ni ege bezonas pli solidan membro-bazon. Celindas ankaŭ tiuj, kiuj simple kredas, ke ni agadas utile.

Antaudankon pro viaj grandaj klopodoj akiri por ni pli da membroj en via lando!

Membrigu rapide por 2012 aŭ 2013!

La ciferoj interprampe indikas la prezojn ekde la 1a de januaro, 2012.

Ĝis tiam validas la malpli altaj tarifoj, egale por 2012 kaj 2013. Se vi ankoraŭ ne remembrigu, kontaktu vian sekciestron tuj, aŭ petu al la Centra Oficejo debeti vian konton favore al ilek-a, au kontaktu nian kasiston, vidu la adreson kaj paĝmanieron en niaj kolofonoj.

Se vi trovas varbilon kun via revuo, bv. uzi ghin por varbi por ni novajn membrojn!

Komence A-lande, poste B-lande

Membreco - IPR presa € 18€ (-->20€) 9€ (-->10€)  
Membreco - IPR reta € 8€ (-->10€) 4€ (--> 5€)  
Juna Amiko - jarabono € 14€ (-->16) 9€ (-->11€)  
JA ekde 3 ekz., po € 11€ (-->13€) 7€ (-->9€)

Antaudankon pro via subteno kaj laboro!  
Stefan MacGill  
Prezidanto, ILEI

Noto: Evidente la plialtiĝo estas 20 %, dum la inflacio ne estas tioma! Antaŭ du jaroj oni duobligis la kotizojn. Ĉu oni petis ankaŭ la opinion de vasta membraro?! Eĉ la enlanda kotizo ne estas tiel alta.

Rita Permeti- la kasistino de Albana sekcio

Raporto por ILEI rilate la 36an Ĝeneralan Konferencon de UNESKO en Parizo,  
25an -31an de oktobro 2011.

Kiam Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet kaj Veronika Poór, reprezentantoj de ILEI ĉe UNESKO alvenis la 25an de oktobro

2011 al la sidejo de UNESKO, la rajtigiloj jam estis pretaj kvankam ILEI oficiale estis akceptita kiel observanto por la 36-a Ĝenerala Konferenco nur dum la konferenco mem, per unanima voĉdonado por akcepto de la rekomendo 36C/13 en kiu ILEI aperis en favora pozicio (tamen okaze de la Ĝenerala Konferenco, oni ne menciis la nomojn de la asocioj proponitaj en tiu 36C/13).

La reprezentantoj multmaniere agadis: alparoloj al oficialaj reprezentantoj de ŝtataj delegacioj kun disdono de dokumentoj, kontaktoj kun diversaj rangaj oficiuloj de UNESKO, k.t.p.

Monique Arnaud intervenis menciante plurfoje Esperanton, okaze de renkonto kun afrikaj ministroj pri edukado pro apero de kleriga serio de libroj por afrikaj infanoj « Bouba et Zaza » kaj Jean-Pierre Boulet parolis kun unu direktoro de la eldonejo kaj kun ties ĝenerala prezidanto kiu deziris rigardi kaj poste konservi la jam eldonitan libron de ILEI: «Rakonto pri tarofolio». La plej interesa renkontiĝo okazis kun du reprezentantoj kaj la ministro pri edukado de Vanuatu (unu ŝtato egalas unu voĉon konsekvence en UNESKO ; por voĉdonado, Vanuatu egalas Ĉinion). Tiu ministro proponis ke Esperanto fariĝu ero de la senmateriala heredaĵo de UNESKO. Eks-vicdirektoro, nun ambasadoro de Laoso al UNESKO, okaze de posta renkontiĝo konfirmis, ke tio estas bona ideo (li lasis sian vizitkarton kaze ke ni bezonus lian helpon.)



Ŝtata reprezentanto dum sia maksimuma 6-minuta parolado foje montris sian intereson pri diverseco de lingvoj kaj kulturoj, tio okazis 25 fojojn el la 138 aŭskultitaj reprezentantoj.

Ni entute kontaktis 22 delegaciojn dum unu semajno kaj Renée Triolle (UEA) samtempe kontaktis pli da delegacioj. (Reprezentantino de alia neregistara organizo invitis Monique kaj Jean-Pierre ĉe sin, inviton kiun ni plezure akceptis.)

Por la posta parto de la Konferenco Veronika Poór kaj François Lo Jacomo transprenis la torĉon por reprezenti nian ligon.

Raportis Monique Arnaud kaj Jean-Pierre Boulet

--

Protokolo de skajpa kunsido de la Estraro de ILEI

La 29an de oktobro, 2011, ekde 11atm (US), 6 ptm (Eŭropo), noktomezo (Ĉinio).

La kunsidon partoprenis ses estraranoj, sed nur kvin samtempe. La tagordo traktis nur kelkajn plej gravajn temojn.

Ĉeestis: Duncan Charters (DC), Stefan MacGill (SMG), Zsófia Kóródy (ZK), Radojica Petrović (RP), Huang Yinbao (HY) (Trezoro). Poste parolis duope la prezidanto kaj Julija Batrakova (JB), reveninte el sukcesa studostago de nia nederlanda sekcio.

45a Konferenco de ILEI (Kunming, Ĉinio)

La skajpado servis unuavice por ekscii lastajn evoluojn pri la konferenco, suplemente al skriba raporto. La datoj estos la 20a – 26a de julio, 2012, kun du tagoj lasitaj por la veturado inter Kunming kaj Hanojo. ILEI kaj LKK ofertis surfacan alternativon al flugado – komuna busveturo ĝis la landlimo kaj uzo de nokta trajno en Vjetnamio. Konsisto de LKK ekzistas, kiel ankaŭ skiza programo, kiu inkluzivas simpozion, kunlabore kun tri universitatoj.

Nia konferenca respondeculo (RP), eldonos en sekvaj tagoj bultenon kun bazaj informoj. Baldau aperos aliĝilo en nia retejo, por ke interesigantoj anoncu sin (kelkaj jam faris tion), kvankam mendilo por ĉiaj servoj aperos nur poste, kiam prezoj estos konfirmitaj. Plenaj informoj aperos en la kvara numero de IPR. RP (kun LKK) preparas viziton al Ĉinio fine de novembro, por konkretigi konferencajn kaj simpoziajn planojn kaj okazigi lingvan kurson, prepare por simila dumkonferenca kurso. RP liveros al IPR kiel eble plej kompletajn informojn antaŭ ol forveturi en la 18a de novembro. Skajpa kunsido semajnon poste permesos aktualigon kaj kompletigon de la informoj. Decidite, ke la enkondukon por IPR4 verkos ne ZK, sed TZ (konsulte kun RP, DC) por ke tiu enkonduko prezentu la konferencon. DC pretigos skizon por artikoloj pri la konferenca kaj simpozia temo (unuavice por revuo Esperanto), sed akirendos artikolo de praktikanta artisto (ajndisciplina) eventuale ĉina.

## Jubileaj preparoj

ILEI aktive kontaktas movadanojn kaj rikoltas reagojn al sia alvoko al Landaj Asocioj de UEA (kaj aliaj) el septembro. La tuja celo estas arigi kaj proponi al UEA internacian liver-teamon, en kiu ILEI aktive rolos, sed cedos la gvidan rolon. Planoj progresas en Germanio, Britio kaj Italio, kun intenco ekaktivi anoncita plurlande, inkluzive de Japanio, Hispanio kaj Kubo. ILEI nun intense laboras pretigi la jubilean retkurson, kies unuaj etapoj estos dissenditaj por komentado ene de deko da tagoj. La skajpintoj konsentis eldoni jubilean kalendaron, kies plurlingva provteksto estis pli frue cirkulita.

## Liberaj oficoj

Estraranoj trovas enorda la enhavon de la alvoko 'Liberaj oficoj en ILEI', kiu aperis hejmpaĝe kaj estis dissendita ene de ILEI. Sekve, tio nun estos dissendita ankaŭ tra kanaloj ekster ILEI por provi akiri laborfortojn ankaŭ de novuloj al la Ligo. Oficoj anoncitaj estas komisiito pri eksteraj rilatoj, pri la multlingva retejo, redaktoro por Juna amiko kaj rubrikestro en Juna amiko kiu preparu materialon por la plej junaj legantoj (5-8-jaraj).

## Buĝeto 2012

Nia kasisto cirkuligis buĝetproponon meze de oktobro. SMG kaj aliaj estraranoj komentos ĝin por ke ni atingu dokumenton por la komitato, traktota per reta voĉdono. Ĝi ne povas eviti la prezenton de deficino similmivela al tiu akceptita por 2011, ĉefe pro malatingo de la atendataj kotizaj enspezoj por 2011. Ni analizos la ciferojn por konstati kialojn por tiu negativa evoluo; tro malfruas nun ripari la situacion por 2011, sed gravos pli forte agi por 2012, ĉu por levi la membronombron, trovi aliajn enspezofontojn aŭ rezigni pri kelkaj elspezoj/projektoj.

Spite la teknikajn malfacilaĵojn komence de la skajpa vokado, la kunsidado poste bone funkciis, kaj montris grandan utilon en la kunordigado de la laboro.

Raportis: SMG. Aprobata de la partoprenintoj.

## ILEI superrigarde

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas tutmonda organizaĵo por instruistoj kaj edukistoj kiuj parolas kaj uzas la internacian lingvon Esperanto. Multaj el ili instruas la lingvon, multaj estas trejnitaj lingvoinstruistoj – sed membreco estas malferma al instruistoj de ajna temo aŭ fako je ajna nivelo, krome al ĉiu ajn ligita al edukado aŭ okupiĝanta pri lingvo-instruado.

ILEI organizas ĉiujaran konferencon kaj eldonas kvaronjaran gazeton Internacia Pedagogia Revuo (IPR). Kune kun partneroj ĝi katalogas konatajn kursojn kaj instruprogramojn de Esperanto kaj okazigas instruistan trejnadon kaj perfektigajn kursojn. Ĝia eldona agado inkluzivas manlibron pri Esperanto-instruado, lernolibroj kaj regula gazeto por infanoj kaj studentoj, Juna amiko.

Por antaŭenigi ĝiajn celojn en universitataj rondoj, ĝi organizas simpoziojn kadre de siaj ĉiujaraj konferencoj. Ĉi tiuj elstarigas iun aspekton de lingvoinstruado aŭ lingvopolitiko en edukado aŭ transnacia universitatnivela komunikado kaj kunlaboro. La Simpozio en Kopenhago (22-23 julio, 2011) havis la temon: „Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado”.

La unua konferenco de la ligo okazis en 1966, la listo de lastatempaj konferenclokoj atestas la kreskantan tutmondecon de la organizaĵo: Bratislavo, Slovakio en 2004, Kaunas, Litovio en 2005, Parmo, Italio en 2006, Ranzan, Japanio en 2007, Portonovo, Benino en 2008, Krakovo, Pollando en 2009, Matanzas, Kubo en 2010, Kopenhago, Danlando por 2011 kaj Kunming, Ĉinio en 2012.

La ligo estis fondita en 1949, kaj estas jure registrita en Nederlando. Ĝi funkcias pere de pli ol 30 landaj sekcioj kun reprezentantoj kaj kontaktpersonoj en pliaj dudeko da landoj, kaj membroj en pli ol 55 landoj. Informoj pri la gvidogrupoj de la ligo legeblas ĉi tie.

La interna esperantlingva retejo de la Ligo troviĝas ĉe <[www.ilei.info](http://www.ilei.info)>. Multlingvaj retejoj de kelkaj elniaj partneroj estas:

<[www.edukado.net](http://www.edukado.net)> Katalogo de Esperanto-instruado, eventoj, instru-materialoj, helpiloj.

<[www.lernu.net](http://www.lernu.net)> – Kursoj kaj suplementaj materialoj tra multlingva interfaceto.

<<http://www.staff.amu.edu.pl/index.htm>> Instruista trejnado en Poznano, Pollando.

<<http://en.wikipedia.org/wiki/Interlingvistiko>> Enkonduko al la studo de konstruitaj lingvoj.

Laste reviziita: 5 marto, 2011 / 4 Nov, 2011

## Konferencoj

La Konferenco de ILEI markas la kulminon de la Liga vivo por la koncerna jaro. Konferencoj havas tri esencajn fadenojn: fakan programon, laboran programon kaj distran oferton.

La faka programo ampleksas prelegojn kun diskuteblo, kursojn, demonstro-lecionojn, forumojn, kaj krome prezenton de la eduka sistemo en la konferenca lando. Kiam eble, la programnivelon levas universitat-nivela du-taga simpozio, organizata kunlabore kun loka au regionaj universitatoj, kun plurlingva programo pri lingvo-politiko kaj komunika demokrateco. Foje okazas ankaŭ paralela instruisto-trejna seminario por sproni la kvaliton de la E-instruado en la konferenca lando kaj en najbaraj landoj. La faka programo povas inkluzivi erojn por la publiko en la konferenca urbo, ekzemple pere de Lingva Festivalo.

La labora programo estas kontrolpunkto por la organizo; ni bildigas la staton kaj evolutendencojn kaj planas la estontan agadon. Formale tion prizorgas la Komitato de ILEI, kies kunsidoj estas publikaj, sed la progresiga laboro povas esti plenumata tra la konferenca semajno pere de komisionoj – konstantaj au dumkonferencaj. La asembleo donas okazon por konferencanoj komenti la laboron, fari proponojn kaj oferti kunlaborhelpon.

La distra programo kontribuas al la entuta etoso de la konferencoj. Unuflanke, oni kunvenas por kreski kaj kontribui fake, oni venas por partopreni en la organiza laboro, sed oni venas plie por refortigi ekzistantajn amikecojn kaj starigi novajn. En nacia vespero, la konferenca lando prezentas sian kulturon, en internacia vespero konferencanoj el dekoj da landoj alportas guston de siaj propraj kulturoj kaj entuziasmoj.

La konferencoj kutime okazas tuj antaŭ au post la Universala Kongreso en proksima loko, sed okazis escpetoj al tio. La evento provizas instigan kolegecan etoson, en kiun povas trovi lokon kaj bonvenon iu ajn, kiu opinias la instruadon de Esperanto grava.

Jen rezultoj en Esperanto de Universitata Simpozio okazigita en 2009 (PDF, versio 1.5 – granda 1.8 MB) dum la lastaj tagoj de la 42a Konferenco de ILEI en Krakovo, Pollando. Trideko da esperant-lingvaj verkoj tra 124 paghoj prilumas la konferencan temon 'La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado' au klarigas la edukan sistemon de la gastiga lando.

La regionaj komisionoj de UEA per siaj fondaĵoj diskonigas kaj instruas Esperanton

En diversaj kontinentoj UEA havas regionajn komisionojn, kiuj okupiĝas pri la disvastigo kaj instruado de Esperanto en tiuj mondopartoj. Aktivaj komisionoj ekzistas por Afriko, Ameriko, Azio, Oceanio kaj la Meza Oriento kaj Norda Afriko. Konkretaj laboroj estis ke ili:

\* Sendis instruistojn aŭ aranĝis kursojn (kunlabore kun ILEI) al i.a Kenjo, Ugando, Burundo, Kongo, Laoso, Indonezio, Latinameriko, Alĝerio, Maroko kaj Samoo.

\* Ĉiuj disponigas librojn, vortarojn kaj instrumaterialon al nepagipovaj kluboj kaj asocioj.

\* Okazigis konferencojn kun ILEI en i.a. Benino kaj Havano.

#### Afriko:

- Partopreno en la Monda Socia Forumo en Senegalo (2010);
- Aktivulaj trejnadaj;
- Informado pri Esperanto;
- Kunligo de landaj asocioj kaj lokaj kluboj;
- Subvenciado de landaj asocioj por ebligi ilian agadon;
- Eldonado de la bulteno Esperanto en Afriko;
- Prizorgado de la retejo pri la Afrika Agado de UEA.

#### Azio:

- Okazigas Azian Kongreson ĉiun duan jaron (en 2010 en Ulanbatoro, Mongolujo);
- Starigis ttt-ejon por instrui Esperanton en aziaj landoj;
- Sendas instruistojn de Esperanto al aziaj landoj kun malforta movado;
- Subvencias eldonadon de lernolibroj kaj vortaroj en aziaj lingvoj;
- Membrigas aziajn aktivulojn al UEA kaj junajn esperantistojn al ILEI;
- Eldonas la bultenon Esperanto en Azio.

#### Ameriko:

- Okazigas Tutamerikajn Kongresojn (en 2011 en San-Paŭlo, Brazilo);
- Helpas eldoni varbfolion por la tuta Ameriko, i.a. en Meksiko kaj Kubo;
- Helpas pri kreo de retpaĝoj (i.a. en Meksiko kaj Venezuelo);
- Okazigas trejnseminaron por aktivuloj.

#### Meza Oriento kaj Norda Afriko:

- Okazigis kunvenojn en Jordanio kaj Turkio;

- Anoncas pri Esperanto en arabaj ĵurnaloj kaj verkas informilojn en lokaj lingvoj;
- Aperigis kaj dissendas la 10-lecionan Esperanto-kurson en la araba, prizorgis retan kurson en la araba;
- Aperigis la libron La trezoro, kolekton de proverboj kaj anekdotoj el la araba kaj islama kulturo.

Oceanio:

- Organizas kongresojn komunajn inter Nov-Zelando kaj Aŭstralio, kien ĝi invitas esperantistojn el landoj de la regiono;
- Starigis retejon por kunligi la esperantistojn kaj proponi retajn kursojn al ne-esperantistoj;
- Eldonas kaj subvencias librojn de indoneziaj esperantistoj.

Eŭropo:

Eŭropa Komisiono ankoraŭ ne ekzistas, bedaŭrinde.

Multaj kapablaj kaj sindonaj esperantistoj en tiuj mondopartoj okupiĝas pri la supre menciitaj laboroj. Finance tio eblas pro tio, ke ekzistas diversaj fondaĵoj tiucele. Iuj el ili eĉ havas propran kapitalon, el kiu ili ĉiujare ricevas renton je dispono. Krom la rento de kapitalo, la fondaĵoj ricevas ankaŭ donacojn por daŭrigi sian laboron.

La antaŭviditaj kaj disponeblaj sumoj en 2011 estas: por Afriko: € 4 550 (+ € 2 000 por la Afrika Oficejo), por Ameriko € 1 450, por Azio € 18 000. Fakte por Meza Oriento kaj Norda Afriko kaj Oceanio ne ekzistas jam propraj fondaĵoj, pro kio ili rekte dependas de ĉiujaraj donacoj. Eŭropa Fondaĵo ja ekzistas, sed ĝi apenaŭ havas monon.

Kiel vi povas kompreni, temas pri relative malgrandaj sumoj, kiuj tamen ebligis tiom da laboro. UEA nun ĉiam pli decide intencas helpi pere de la regionaj komisionoj la disvastigon de Esperanto en la tuta mondo. Tion ni povos fari nur per via helpo. Se vi deziras subteni la agadojn de tiuj komisionoj, vi povas sendi mondonacon al la komisiono(j) de via elekto, pagante al UEA laŭ la kutimaj pagmanieroj kaj indikante al kiu komisiono vi volas donaci.

Loes Demmendaal

Komisiono pri la reta Jarlibro de UEA

Karaj, bv sciigi al komisiito pri la reta jarlibro pri la sxangxoj de nia delegito Sajmir Beqiraj el Albanio.

Nomo Sajmir

Familia nomo Beqiraj

Hejma telefono 00355 4 240 21 65 00355 4 240 21 65

Portebla telefono 00355 68 40 30 613 00355 68 40 30 613

Hejmadreso: Rr Muzaket, nd. 27, h 2, ap.38 Tirana 1001 Albanio

Retadreso: s\_beqiraj@yahoo.com, sajmir.beqiraj@fshn.edu.al

S-ro Sajmir estas doktoro de biologia sciencoj cxe Fakultato de la Naturaj Sciencoj, Tirana Ŝtata Universitato

Problemoj de AIS

(Maltrankvilo de s-ino Alicja Lewanderskaja)

Estimataj samideanoj

Mi promesis al mia kara kaj respektinda edzo/ Dieter

ke mi lau proverbo : tenu en busho akvon kaj atendu rezulton chu almenau finon

de tro mirakla por kelkaj agemaj anoj de AIS - diskuto au ech debutoj ?kiu kiel la ondo de akvo fluas kaj fluas ...

Prof Minnaja saghe alimaniere , konkrete sed triste tion komparis kiel la chesto dum lito de mortinto - au tiu kiu ne volas ankoraŭ tuj morti

Se Dieter forjhetos min de domo/ eble iu montros al mi iujn tendojn \_ -Kial -  
char mi ne eltenis kaj ...  
do mi diros de komenco >

1/ char...

Tamen venis laste al mi multe da protestoj, demandoj kaj duboj fare de AIS absolventoj  
kaj profesoroj el PL, BG Albanio, Kazahio, Litovio, kaj Ro-

I.a oni pridubas - chu - /ke -/AU - demokratio ne signifas debuto pri nenio  
au pri chiu fare de kelkaj klubanoj, kiuj evitas aliajn.

Mi tre pardon petas se iu ofendighis , sed mi samtempe pakas chiujn leterprotestojn kaj aliajn leterojn  
kaj sendas al

aktuale almenau gis fino de jaro mastrumantaj chefoj de AIs- pli bone se ili respondu ne mi.

2/Mi dum lasta SUS en Sibiu citis la opinion de prof prof- famaj ne nur interlingvistoj

sed mond konataj esperantistoj- kiel Lapenna, Frank, Kotarbinski, Milewski, Klemensiewicz  
Popov , Grego chu Tyblewski- ke oni nun forgesu pri kanono de diskutretorik- parolkapablo  
Bedaurinde oni nur ekz ( mi citas ekz de DE kaj PL bv ne tuj mortigu min- ) opinias ke se oni ofendos,  
krios, kritikos ech uzos vulgarismon

- do montras sian potencon. Ne! Tiuj ecoj lauh Lapenna chu prof Wojtyla-chu famaj Poloj- Papee

(patro de Ania Gibinska el Bydgoszcz) estas ghuste la simptonon de malforteco

chu uzante iom pli forte indolentecon.Au alimaniere dirante malforteco kaj manko de argumentoj nur  
enhavo de sloganoj.

Lau konata kaj kritikata de ( frue menciitaj autoritatuloj ) metodo :

ONI / evitos malamikon au konkurenton de diskuto, ne ebligos al Ili au pri Ili kaj Iliaj agdoj enmeti  
informojn en amaskomunikiloj

( vidu en Pl agadon Tusk- Palikot)

3/ Legante ne leterojn de Senato al anoj de AIS sed de skizaj raportoj en Libera folio- malferma por  
chiuj ne nur esperantistoj-

por kelkaj meritaj au junaj fortoj el esperantujo ofte ankau anoj de AIS - aperas duboj au simpla tristeco.

Kie malaperas la ideo de amikeco , TOLEREMO ktp \_ chef devizo de Esperanto kaj AIS ?

Kial ? Dum la tuta disputo -kion detale disvastigis Ondo kaj Libera Folio- iomete oni forgesis paroli pri  
efikoj kaj meritoj de

AIS kaj pene agemaj anoj.Ni ne forgesu ke ni estas homoj kaj en agado chu vivo de homoj /CHiam estas  
pluŝoj kaj minusoj- kaj ankau sukcesoj chu malvenkoj. Ne al chiu homoj plachas la sama arbo kaj floroj,  
Vi ne kredas ? Chu al chiu plachas la verkoj de Hesse chu Grass au Nemere?

Sed chu nenion fari nur kritiki tio estas ghusta metodo por simplaj homoj ne dirante pripolitikistoj chu  
sciencistoj au literatoj(literaturistoj ?)



4/Chu la devizon ke pri ni/ ni parolu klare kurage kaj komune/ideo de A.CSEH kaj I. Lapenna/krome amike serchu rimedon por plibonigado\_ oni forgesis.AIS ESTAS SCIENCRONDA monda KOMUNUMO

/ Do chu estas eraro au oni miksas homojn chu hazarde forgesis-Demandon mi direktas al diskutgrupo o sub la gvido de se ni bone komprenis el salutmesagho lasta kol el Libera Folio- eble mi miskomprenis ?Chu li estas ano de AIS oni nur scias KE JES LI ESTAS ANO DE TEJA- TRE <AKTIVA., talenta , helpema kaj bona jhurnalisto, iam tre aktiva aganto de UEA- ALIA DISKUTANTO ESTAS ANDREAS KUNZLI .LI IAM ESTIS ano de AIS - SED FORIRIS.\*SN/!1695 /nr / 020./1996 TRE BEDAURE CHAR EBLE BONE KE LI RESTU KAJ PLU AGU/HELPU- Au oni ne bone pritaksas aadon de AIS char oni ne partoprenas AIS arangojn kaj en esperanta gazetaro mirakle aperas diversajhoj sed malofte informojn pri AIS agadoj ktp

5/Eble ni iomete troigas- bv pardoni al mi- tio tamen ne estas nur mia privata opinio-sed tro ofte kelkaj ne chiuj anoj de UEA ne amike pritaksas kelkajn niajn samideanojn de Heroldo kaj Civito- Tamen oni honeste konstatu- ghuste nur ili dum lasta jaro aperigis neutralan kaj ech pozitivajn informojn pri AIS.Dum en alia ni ne trovis informojn. Mi ne indikos SOS en lasta Ondo-

6/Laste rete la informoj pri AIS iras monden- sed ne al chiuj AIS aktivuloj. Chu oni laste forvishis de mapo Albanion- Ro kaj PL ? Lau informo nur okazis tertremo en Oslo kaj Bukaresto- sed neniu bombo detruis AIS filiojn chu klerigejon ?chu? Au oni perdis adresojn de tro agemaj kaj ghis nun plej ofte sendataj al ekzamenoj- por bak chu mag en AIS \_ plej aktivaj anoj de AIs de Bydgoszcz , Silezio , W-wa chu Tirana?- Gvidantoj de tiuj lokoj - certe ne gajnas ,monon- eble malagrablagon chu kritikon ofte perdas char helpas al studentoj kaj lekciistoj- de AIS . Ili la tutan jaron laboras - ebligas senpage lokon,de propra posho - pagas por elektro kaj hajtigado ( permesas uzi komputilojn ) Ili ne havas de tio profitojn- male!-... ( ekzemplo- direktoro de AKB ISTK Bydgoszcz Ascii Ais mgr A. Grzebowski)

CHU ili - RICEVAS KOPION DE LETEROJ DE WANDEL CHU NE Se oni uzas kiel perilon la helpon de Libera folio.- bv ankau al ni sendu kopion Chefo de Libera folio - samideano agema kaj talenta esperantisto jes bone, - private tre simpatia homo Sed chu li estas ano de AIS kaj de kie li konas la AIS aferojn-

7/Nia demado bv sincere respondi-

Chu UEA kaj aliaj pluraj landaj asocioj de Esperantujo ankau ne havas problemojn kaj EU .

Chu la solvo de aperantoj problemoj au ech evoluo de mondo au ene de Europo - estas nur atako kaj daura MILITO-

(eble tamen dum SUS en Sibiu- la forta vorto uzita de Eugen Macko- estis bezonata, por konkrete nomi la agadon de iu individuo )

Au tamen oni bezonu la serchadon de iu logika eniro- de komplika situacio. Sed nun ne nur en Europo la lernado kaj studado

havas problemojn.La mondo transformighas kaj tio ne estas rapida kaj simpla procedo.

Kaj chu la ideo de kreinto kaj fondinto de AIS prof HG FraNK TAMEN estas(NE ESTAS ? racia , bezonata kaj sagha kaj atestas necesan daurigon

Se tia maniere oni ne pritaksas -la atingon kaj meriton de AIS por la tuta esperantujo-

DE KIE APERIS PREMIOJ DONITAJ - DUM UK- 2011-POR 3AKTIVULOJ EL AIS

FRANK; GRZEBOWSKI ;CASQUERO ?

Iu proponis ilin- iu KOMISIONO PROTAKSIS ILIAN LABORON KAJ ENANGAGHIGON kaj aprobis-

IA VERDIKTO SONIS DIPLOMOJ POR MERITO PRO DISVASTIGADO

DE PACA KAJ BELA IDEO- POR KAJ PERE de LA ESPERANTO:

8 - Kopioj de ronda diskuto pri kaj por AIS iras rekte al kol.al Ewa B - tre simpatia kaj sagha virinoJ - MERITA KAJ BONA ESPERANTISTINO

-sed ne shi gvidas AIS BG sed Leonov.

kaj al prof .Butan - AIS Rumanio GVIDASpor RO EN SIBIU - Konehrt; MIHALESCU kaj Tanc

9- NOME DE AIS PL kaj SULEZIO; krome de REPRESENTANTOJ DE ALBANIO-

Oni TRANSDONAS

DANKON AL AIS SM - MALNOVA SENATO KAJ GRATULON AL NOVA:DEYIRANTE KROME SANON

FORTON KAJ LONGAN VIVON

ONI TAMEN MODESTE PETAS KAJ DEMANDAS CHU ONI NE POVINTUS TAMEN AUSKULTI KAJ LEGI PRI

AIS KAJ VIZITI DE TEMPO AL TEMPO AIS

SURLOKAJN ARANGHOJN. UK ESTAS BEDAURINDE TRO KOSTAJ KVANKAM CERTE BELEGAJ

ARANGHOJ.STUDENTOJ KAJ PLIMULTO DE ESPERANTISTOJ

NE ESTAS RICHULOJ.

CHU EBLAS /NE EBLAS? JES EBLAS!

EKZEMPLE

Jen inda por IMITI LA ideo

/de AIS SM PREZIDANTO samtempe la la Prezidanto de LKO prof F Penachietti>

kaj ano de nova nuna AIS senato prof Corsetti >

Dum Itala 78/a Kongresokongreso en Torino organizantoj subtenis mone ebligante por pluraj homoj cheesto/ kelkajn partoprenantojn

.  
KAJ DUM KONGRESO OKAZIS OFTE REKLAMOJ KAJ INFORMOJ PRI AIS  
TRE KONKRETE KAJ PRECIZE .

Ekz ENKONDUKAN INFORMOJN PRI AIS PREZENTIS vic.prez de AIS SM prof C Minnaja  
komence de mia prelego

(TEMO DE MIA PRELEGO ESTIS EUROPO KAJ FAKO DE EUROLOGIO- EUROPISTIKO (?))

EN LA PROGRAMO DE AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ- aKADEMIO 30 CHU 20 JARA?

Krom prelego okayis ankaŭ prezentado de mia libro kaj libro de PROF FRANK kaj aliaj fakuloj de EU por studentoj

NE NUR DE AIS :

Simile mi prezentis kun PROF MINNAJA dum UKu en Kopenhago ankaŭ chi\_jare / informoj publike pri AIS)

-KVANKAM CHIUJ SCIAS MI REMEMORIGAS KE -PROF C. Minnaja-ESTAS AIS SM VIC: PREZIDANTO;  
SENATANO; DENASKA ESPERANTISTO

LI ESTAS TRE AKTIVA KAJ CHIAM HELPEMA.

. GHUSTE LI mallonge sed tre precize

salutante dum malfermo en Torino donis al cheestantoj konkretajn informojn pri AIS agado kaj poste kune kun prof Penacchiatti; mi, kaj Leonov donis respondon kaj informon por interesitoj. Mi kaj Leonov dum la Verda foira tago informis pri AIS SM KAJ LANDAJ FILIOJ/ kaj diskonigis informmaterialojn>

Subtenis nin tre bela < gaja sed serioza kaj talenta grupo !15 junaj fortoj- ghuste el PL KLERIGEJO AKB gvidata de kol Basia Zora -eks aktorino

Polaj junaj fortoj ne nur cheestis en Torino inauguron de kongreso sed ankaŭ chestis kelkaj prelegoj, krome prezentis al publiko belegajn dancojn kaj kantojn.

Al junuloj kaj al tuta pola grupo de AIS AKB kaj ankaŭ al mi persone tre plachis e- kursoj de Anna Lowenstein ano de AIS, Kristin Tytgat kaj Nina Pietuchowska/

de iama AIS filio el Bialistok KAJ PREJEGOJ DE BERTRAND HUGON, PAUL GUBBINS

Modelo inda por imiti estis forumo gvidita de NICOILA MINNAJA\*lingvo chu faktoro por unuecigo au por divido (

Tiun lastan kun helpo de kolegoj R, Fosmeier,(specialisto pri ludteorio ) T.Liberska, C, MINNAJA.Z.Hirst KAJ G IOBIN/ MI PROVIS RIPETI DUM FINO DE MIA

KURSO EN SIBIU -pri Eurologio., atestante eblon de venko de ghentila formo de diskuto kaj logikaj argumentoj , dum shango de diversaj opinioj

KORAN DANKON AL CHIUJ PRO HELPO KAJ PETO POR PLUA HELPO

DO TAMEN MI ALMENAU SKIZE PROVIS ATESTI KE AIS unuopaj filioj estas plu aktivaj kaj en ili junaj kadroj kreskas

/Rimarko junuloj polaj, chehaj kaj albanaj en 2007 ne nur partoprenis dum AIS Stud. en Cieszyn PL sed helpis por prilaborada kaj tajpado de kursoj en AIS instruteko bv vidu teamon: pri Eurologio.

NOME DE ANOJ DE AIS PL KAJ SILEZIO  
ALICJA LEWANDERSKA

Tutmonda Skriba Ekzamensesio

From: Katalin Kovats <katalin.kovats@gmail.com>

Saluton,

UEA-ITK organizas Tutmondan Skriban Ekzamesesion dise en la mondo,

tio signifas, ke povos okazi ekzamenoj ankaŭ en via urbo kaj Esperanto-grupo.

Jam aliĝis 5 lokoj: Tuluzo (FR), Chaux-de-Fondos (CH), Herzberg (DE), Jekateringburg (RU) kaj Tijuana (MX). <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

La ekzamentago estas la 9a de junio 2012.

Pri la kondiĉoj vi povas legi pli da informoj ĉe la paĝo: <http://edukado.net/novajhroj?id=186>

Por inspiro spektu kiel varbas por la ekzamenoj la konata Esperanto-kantisto: JoMo:

<http://www.youtube.com/watch?v=8qQoIY9h9a0>

Atendas vian kontaktmesaĝon la ekzamenkomisiono de UEA

Dr. Katalin KOVÁTS, lingvoinstruisto, redaktoro

Retposxtadreso: [katalin.kovats@gmail.com](mailto:katalin.kovats@gmail.com)

Vizitu: <http://www.edukado.net> la servon de Esperanto-instruistoj

Kaj sercxu Esperanton ankaŭ cxi tie: <http://www.vggallery.com/index.html>

Instrukcioj de ILEI

Sent: Monday, October 24, 2011 4:43 PM  
Subject: Al: Sekciestroj kaj reprezentantoj de ILEI

Karaj kolegoj,

En nia revizio de la Statuto kaj Regularo, ni precizigis la komencan kaj finan daton por la trijaraj mandatoj de niaj sekciestroj kaj komitatanoj. Ni konsentis, ke tio okazu je la 31a de marto, 2012.

Tio signifas, ke la nova konsisto de nia komitato ekzistos por la elektotempo de nova estraro de ILEI, kiu okazos en julio 2012.

Baldu vi ricevos de ni formularon per kiu vi nomumu vian sekciestron au reprezentanton por la sekvaj tri jaroj, kaj por ke sekcioj nomumu siajn komitatanojn por la periodo de marto 2012 ĝis marto 2015.

Via propra sekcia statuto tre eble difinas kiumaniere la sekcio elektos tiujn oficonojn. Ni avertas vin frue pri tio, por ke vi havu tempon fari la necesajn paŝojn.

Kune kun tiu deklaro, ni sendos la ĉiujaran enketilon per kiu via sekcio (kaj reprezentantoj) raportu pri la enlanda agado dum 2011. Ni mallongigos tiun enketilon, por ke la respondado estu pli facila.

Ni krome memorigas al vi, ke perreta komitata voĉdono venas al fino en la 31a de oktobro, do post nur kelkaj tagoj. Alvenis malmultaj respondoj ĝis nun; ni forte apelacias al ĉiuj komitatanoj – retrovu la mesaghon (serchu "VDON") kaj voĉdonu tuj! Sekciestroj! Bonvolu kontakti viajn komitatanojn kaj instigu al ili voĉdoni! Dankon!

Kore salutas

Trezoro kaj Stefano

Sekretario kaj prezidanto de ILEI.

--

skajpo:haungyinbao

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj(ILEI)

<http://www.ilei.info/>

El niaj leteroj

Rilate la artikolon publikigite en numero 97 pri la stagnado de nia enlanda esperantista Movado, prof. Renato Corsetti skribis:

La artikolo de Bardhyl Selimi estas atentinda!

Mi ĉiam demandis min, kial Albanujo ne povas esti normala lando kun landa asocio, ilei-sekcio kaj tejo-sekcio memstaraj sed laborantaj kune.

Por komenci, Bardhyl, kolektu ĉiujn albanajn esperantistojn kun ret-adreso en ĉi tiu listo kaj ni havu ĝeneralan diskutadon pri kiel fondi la albanan landan asocion kaj la instruistan kaj junularan sekciojn.

Amike Renato

To: [eli@esperanto.org.il](mailto:eli@esperanto.org.il)

Karaj, hieraux atingis min la numero 154-155 de via sxatata revuo. Elkoran dankon!

Gxi aspektas cxiam pli kvalita ne nur forme sed ankaux enhance.

Inter abundaj legindajxoj en gxi mi apartigas la rememorojn de amiko Sxemer veterano pri via movado kion li faras tre modeste kaj sincere. S-ro Shemer estas vizitinta nian landon 10 jarojn antauxe kaj mi konservas plej bonajn impresojn de li, ankaux pro renkontigxoj pluaj en Italio kaj Nederlando. Same mi mencias la rakonton de Amri Wandel "De Tel-Avivo al Kopenhago kaj reen". S-ron Wandel mi estas vidinta defore en UK Firenze kaj UK Roterdamo, sed bedausrinde ne havis la okazon persone babili. Eble grupo de izraelaj esperantistoj venos iam en Albanion kaj ni renkontigxos.

Antaux kelkaj tagoj nia cxefministro Sali Berisha vizitis Tel-Avicon enkadre de oficiala protokolo responde al la vizito de via ministro pri eksterlandaj aferoj monatojn antauxe. Ambauxokaze oni

priparolis pri komerco reciproka kaj investadoj far izraelaj entreprenistoj en enegitiko kaj agrikulturo. Kvankan via registaro ankoraux ne rekonis la sendependecon de Kosovo, ni restas espere ke tio okazos baldaux, des pli ke cxe albanoj hebreaux cxiam trovis sekuran rifugxejon dum jarcentoj, ex dum nazia epoko.

Ankoraux dankon, cxion bonan al vi, amike Bardhyl Selimi , Tirana, Albanio

Respondoj:

Letero de Josef Shemer- Izraelo

Kara Bardhyl,

Mi tre gxojis ricevi vian belan leteron. Dankon pro la lauxdoj...

La viziton de nia grupo internacia en Albanio, gvidite de vi, mi neniam forgesos. Gxi estis unu el la plej interesaj ekskursoj, kiujn mi faris en mia vivo. Kompreneble la sukceso estis akirita pro vi!

Nun mi ne povas iri al eksterlando. Ankaux en Kopenhago mi ne estis. La kauxzo: mi havas sango-malsanon cxar mia osta medolo ne produktas suficxe da sango-globuloj. Mi tre versxajne devos pasi greftadon de osta medolo. Malgraux tio mi fartas bone cxar tiu cxi malsano (nomata MDS) tute ne kauxzas suferadon, sed mi havas zorgojn pri la estonteco.

Do, espereble mi resanigxos kaj povos reveni al la esp. Universalaj Kongresoj kaj ekskursoj.

Mi salutas vin amike,

Josi

Artikoloj pri Albanio

Ekonomio

ALBANIO

Riĉa tero, malriĉa popolo

En la jaro 1922 la aŭstro Ernest Nowack desegnis la unuan geologian mapon de Albanio je skalo 1/200 000. Tiel li malkovris la areojn enhavantajn nafton en la regiono Vlore-Berat kaj la mineralojn en la regiono Mirdite-Puke.

Poste italaj kompanioj komencis ekspluati diversajn minejojn. Post la dua mondmilito la ŝtato kreis geologian servon kun vasta reto da laboratorioj, esplorantoj kaj institutoj kaj fondis la geologian fakultaton ĉe la tirana universitato.

Historie la unua mineralo ekspluatita en la lando estis bitumo. En Selenica troviĝas dumiljara minejo de tre bonkvalita bitumo, kiu estis uzata i.a. por pavimi la bulvarojn de eŭropaj ĉefurboj, kaj eĉ tiujn de Tokio kaj Pjongjango.

Dum la komunisma reĝimo mineraloj estis la ĉefa fonto por „trarompi la blokadon” kaj certigi al si valuton. Tiuperiode la minejoj estis ege sed malzorge ekspluatitaj. Ekzemple estis venditaj ĉirkaŭ 33 milionoj da tunoj da kromio.

Post la jaro 1990 la stato de la minejoj estis mizera kaj preskaŭ ĉiuj fermiĝis. Nur dum la lastaj dek jaroj revekigi la intereso de la eksterlandaj kompanioj por ricevi minejajn koncesiojn, des pli ĉar jam ekzistas pretaj studoj pri la disvastiĝo de la mineraloj.

#### Elitaj mineraloj

Kromio troviĝas koncentrite en kelkaj areoj (Bulqize, Tropoje, Kukës, Lure kaj Pogradec). Ĝi estas sufiĉe bonkvalita kaj la merkato estas certa. La transporto okazas tra la marhaveno de Durrës. Kie estas kromio troviĝas ankaŭ kupro. Koncentrite ĉefe en la nord-oriento de la lando, la kupraj rezervoj atingas 20 milionojn da tunoj. Kun la kupro estas ligita ankaŭ oro kaj arĝento, en kelkaj areoj (Gurth, Munelle, Qafe Bari) ĝis 5 gramoj je tuno.

#### Mineraloj por industrio kaj konstruado

Fakuloj taksas je 213 milionoj da tunoj la rezervojn de feronikelo (alojo de fero kaj nikelo) kaj je 103 milionoj da tunoj por nikelo-silikato. Post 20 jaroj da silento diversaj kompanioj (i.a. granda turka kompanio en Elbasan) ekinteresiĝas pri ĝi. Oni povas vidi la grandkvantajn stokojn de feronikelo en la eksa minejo de Prrenjas.

Aldoniĝas la kalkaj rokoj kaŝantaj bazajn konstrumaterialojn kiel kalko kaj cemento. Estas ĉirkaŭ 500 milionoj da tunoj tiaj. Tri eksterlandaj kompanioj jam ekspluatas ilin en la regiono inter Kruja kaj Laĉo. Dekoraciaj platoj kaj ŝtonoj troviĝas abunde tra la lando. Oni eĉ malkovris rarajn fosforeskajn ŝtonojn bonkvalitajn.

La karbo servas por pluraj termocentraloj konstruitaj kaj konstruataj. Aparte la karbo de Krraba kaj Memaliaj estas je kvalito ene de internaciaj normoj. Entute la aktualaj rezervoj atingas 712 milionojn da tunoj.

#### Granda prisana problemo



Ekestis danĝero pro radioaktiveco en kelkaj regionoj inkluzive de la ĉefurbo pro la grandaj stokoj de mineraloj kaj pro la uzado de radioaktiva fero por konstruado aĉetita malmultekoste en Ukrainio. La nivelo de la kancerofara radon-gaso du- ĝis tri-obliĝis. Rezulte pliiĝis la nombro de homoj trafitaj de kancero en Tirano, Koplik, Pogradec, Bajram Curr kaj aliaj minejaj areoj.

Likvaj resursoj

Albanio flosas sur nafto kaj dolĉa akvo. Laŭ UN-raporto, en la mondo 66 % de la akvo ekspluatiĝas por la agrikulturo, 20 % por familioj, 10 % por industrio kaj 4 % elvapiĝas. En Albanio nur 20 % ekspluatiĝas, la cetero fluas en la maron.

Nafto troviĝas ne nur ene de la lando sed ankaŭ en la maro. Multaj kompanioj serĉas kaj ekspluatas ĝin. La lastjara produktado estis ĉirkaŭ unu miliono da tunoj. Tio estas multe sub la plej alta cifero de 2,1 milionoj atingita en la jaro 1974. Restas ankoraŭ rezervoj je 387 milionoj. En la suda regiono troviĝas ĉirkaŭ 320 milionoj da kubaj metroj da gaso.

Nudpiede sur ora tero

Kvankam la lando estas riĉa je mineraloj la vivnivelo estas ankoraŭ relative malalta. Ĉirkaŭ 80 % de la loĝantaro de la minejaj areoj estas malriĉaj. Pro tio plioftiĝas la protestoj kaj strikoj fare de ministoj kaj iliaj familioj. La kompanioj promesis investi pli ol 20 milionoj da eŭroj sed faris preskaŭ nenion.

En Bulqiza, kie iam agadis la itala kompanio Darfo kaj aktuale la rusa-aŭstra kompanio ACR (Albana Kromio), pro malbonaj laborkondiĉoj estas mortakcidentitaj kelkdek ministoj. Fine de julio 2011 13 ministoj komencis malsatstriki en galerio je profundo de pli ol 1000 metroj. La loĝantoj blokadas la nacion vojon multajn horojn. Necesas la interveno de la ŝtataj organoj, sed ankaŭ ĉe altaj tieaj niveloj ekzistas notinda korupto.

Bardhyl SELIMI

---

Moderna vivo

KOMUNISMO

Murdoj memorigitaj

La 9an de septembro oni memorigis per solenaĵo en Tirano, Albanio, la 65an datrevenon de la kontraŭkomunista ribelo de Postriba, verŝajne la unua tia en orienta Eŭropo post la dua mondmilito.

Pro tio, ke la sekurecaj servoj anticipis la ribelon, kaj pro la interveno de la jugoslavia armeo (tiam Albanio kaj Jugoslavio estis intimaj amikoj), la ribelo kolapsis. Mortpafitaj estis dekoj da homoj, arestitaj kaj poste kondamnitaj al longdaŭra enkarcerigo 1200 aliaj.

Kelkaj iamaj arestitoj kaj iliaj familianoj partoprenis la solenaĵon, kune kun politikistoj kaj aliaj eminentuloj.

## Terorismo

Per videokonferenco parolis el Usono profesoro Sami Repishti, eksa ribelulo. Li substrekis la sangvenĝan instaligon de komunismo en Albanio, ties ŝtatan terorismon kaj la sekvan rezistadon flanke de patriotoj, kontraŭkomunistoj kaj intelektuloj.

La politikaj ŝanĝoj en 1990-1991 estiĝis sensange kaj senvenĝe, sed, aldonis Repishti, la ŝtatpotencon ankoraŭ posedas eksaj komunistoj kaj ties posteuloj. Ĉi-lastaj pliriĉiĝas ekonomie kaj politike plifortiĝas ĉirkaŭ maldekstraj partioj.

Estas ĝuste tiuj partioj, laŭ Repishti, kiuj jam de pluraj jaroj blokas en la albana parlamento reformojn necesajn por aligi la landon al EU.

## Reĝimo

Eksaj persekutitoj kaj ties gefiloj ŝokiĝas – tiel Repishti – kiam ili renkontas en ŝtataj oficejoj, en la parlamento, siajn iamajn persekutintojn. Ekzemple la ĉefo de la socialistaj deputitoj estas eksa ministro pri internaj aferoj. Aliaj deputitoj aŭ eĉ ministroj estas gefiloj de eksaj altranguloj de la komunisma reĝimo.

Cetere la eksaj ĉefkomunistoj (ekzemple la lasta diktatoro, Ramiz Alia, kaj la vidvino de la diktatoro dum 46 jaroj, Enver Hoxha, se ne menciis centojn da aliaj) ankoraŭ ne pardonpetis pro la krimoj de la tiama reĝimo.

En Albanio, atentigis Repishti, oni ankoraŭ ne hontas pro la nomo „komunisto”, kontraste al Italio aŭ Germanio rilate „faŝisto” aŭ „nazio”.

En la Nacia Historia Muzeo, kie okazis la solenaĵo, ekzistas ekde pluraj jaroj pavilono pri la genocido komunista. Ĝi estas ege vizitata ankaŭ de alilandaj turistoj.

Bardhyl SELIMI

Informaĵoj- anoncoj

Afiŝo de Edukado.net kun ankaŭ albana teksto



Esperanto, langue vivante !

L'espéranto est une synthèse  
géniale des grandes langues de  
culture, élaboré pour permettre

La Ligue Internationale

des enseignants  
espérantophones

La Internacia Ligo de

[www.edukado.net](http://www.edukado.net)

Service pour les enseignants de l'espéranto

Servo por Esperanto-instruistoj

Sherbimi per mesuesit-esperantiste



[www.lernu.net](http://www.lernu.net)

Avec les pages en 20 langues de lernu !,

Vous pouvez apprendre la langue « Espéranto »

Per la multlingva paĝaro lernu!

Vi povas eklerni la lingvon

la communication entre des peuples de pays et de cultures différents.

Grâce à sa structure précise et régulière, il est plus facile à apprendre que les langues nationales.

Contrairement aux langues nationales, il permet de communiquer sur un pied d'égalité entre les peuples, chacun ayant fait l'effort de l'apprendre.

Proposé en 1887, par le Dr. L. Zamenhof, son usage par des millions de locuteurs à travers le monde montre que cette langue évolutive répond parfaitement à l'attente de ceux qui souhaitent échanger avec des personnes étrangères sans avoir recours à des interprètes ou à une langue dominante.

Esperanto, vivanta lingvo !


Esperanto, nje gjuhe e gjalle!

Esperanto estas genia sintezo de gravaj kulturaj


Esperanto eshte nje sinteze gjeniale e gjuheve te

Esperantistaj Instruistoj

LIDHJA Nderkombetare e Mesuesve Esperantiste



[www.ilei.info](http://www.ilei.info)



Cultivons la paix

« Esperanto ».

rendesishme kulturore, e perpunuar per te lejuar komunikimin ndermjet popujve te vendeve dhe kulturave te ndryshme.

lingvoj, ellaborita por permesi la komunikadon inter la popoloj de malsamaj landoj kaj kulturoj.

Dank' al sia preciza kaj regula strukturo, ĝi estas pli facile lernebla ol la naciaj lingvoj.

Fale struktures se sakte dhe te rregullt te saj ajo eshte me e lehte per tu mesuar se sa gjuha kombetare.

Kontraŭe al la naciaj lingvoj, ĝi permesas komuniki egalrajte inter la popoloj, ĉiu farinte la strebon ĝin lerni.

Ndryshe nga gjuhët kombetare, ajo na lejon te komunikojme me te drejta te barabarta ndermjet popujve, ku secili eshte perpjekur ta mesoje ate.

Proponite en 1887, de D-ro. L. Zamenhof, ĝia uzo de milionoj da parolantoj tra la mondo montras ke tiu evoluema lingvo respegulas perfekte je la atento de ĉiuj, kiuj deziras interŝanĝi kun eksterlandaj homoj sen havi helpon de la interpretistoj aŭ de alia hegemonia lingvo.

E propozuar ne vitin 1887 nga dr L. Zamenhof, perdorimi i saj nga

Ĉiu kultivu pacon

Secili te rrise paqen

[www.unesco.org/cp](http://www.unesco.org/cp)



Présente dans 46 pays, ses buts principaux sont :

- accélérer l'enseignement de l'espéranto.

- former des enseignants.

- organiser des sessions d'examens.

- éditer des manuels modernes.

Pour vous aider :

Por helpi vin :

Per tju ndihmuar juve:

Espéranto ?

- 52 300 000 de réponses avec Google

le 29.09.2011.

- 52 300 000 da respondoj per Google

la 29.09.2011.

52 300 000 pergjigje per Google me 29.09.2011

- rapprocher enseignants et leurs élèves,

organiser leur collaboration.

Deux revues : « Internacia Pedagogia Revuo »

pour les enseignants et « Juna Amiko » pour

les jeunes.

miliona foles neper bote, tregon qe kjo gjuhe me prirje per zhvillim pasqyrohet persosmerisht ne vemendjen e te gjithëve qe deshirojne te shkembejne me njerezit e vendeve te tjera pa pasur ndihmen e perkthyesve apo te ndonje gjuhe tjeter hegjemone.

Notre action

dans le monde

Ĉeestas en 46 landoj. Ĝiaj celoj estas :

- akceli la instruadon de Esperanto

Jane te pranishem 46 vende.

Qellimet e saj jane:

Te nxise mesimdhenien e Esperantos

- trejni instruistojn

Te stervise mesuesit

- okazigi ekzamenojn

Te organizoje provime

- eldoni modernajn lernilojn

Te botoje mjete mesimore moderne

Nia agado

en la mondo

Veprimtaria jone ne bote

Nos programmes permettent à des enfants de différents pays de découvrir leurs cultures respectives grâce à une langue commune :

Niaj programoj permesas al infanoj el malsamaj landoj malkovri siajn respektivajn kulturojn danke al komuna lingvo :

Programet tona u lejojne femijeve te vendeve te ndryshme te zbulojne kulturat e tyre perkatese fale gjuhes se

www.esperanto.net = informoj en 57 lingvoj

informata ne 57 gjuhe

www.lernu.net = kursoj en 33 lingvoj

kurse ne 33 gjuhe

www.edukado.net = pli ol 500 ekzercoj

me shume se 500 ushtrime

Renseignements sur l'espéranto et

l'ONG-ILEI :

monique.arnaud@aliceadsl.fr

bouletjeanpierre@gmail.com

francois.lojacomowanadoo.fr

r

poorveronika@gmail.com

secrétaire de ILEI

ILEI-sekretario: Huang Yinbao

Sekretari I ILEI: Huang Yinbao

ilei.sekretario@gmail.com

Jingchuan-Xian, Esperanto-

- proksimigi kaj kunordigi  
esperanto-

instruantojn kaj iliajn lernantojn.

Te afroje dhe bashkerendoje  
mesuesit e esperantos dhe  
nxenesit e tyre

Du revuoj : « Internacia Pedagogia  
Revuo » por la

instruistoj kaj « Juna Amiko » por  
la junuloj.

Dy revista : « Revista Pedagogjike  
Nderkombetare » dhe « Miku i Ri »  
per te rinjte.

perbashket

AKEL : Communication  
alternative entre des écoles  
européennes, Socrates -  
Comenius. Alterna komunikado  
inter eŭropaj lernejoj.

SPRINGBOARD : Tremplin pour  
les langues.  
[www.springboard2languages.org](http://www.springboard2languages.org)

FRINGOJ - Festa Renkonto  
INternacia

GeknabOJ :

Fringoj- Takim festiv  
nderkombetar I femijeve

- Rencontre Internationale des  
enfants.

- Internacia Renkonto por  
infanoj.

Takim nderkombetar per femijet

Conférences annuelles de ILEI :

Jaraj konferencoj de ILEI :

Konferencat vjetore te ILEI

2007 Ranzan Japon

2008 Porto Novo Bénin

2009 Cracovie Pologne

box 16800#,

Pingliang, Gansu, CN-744300  
- Chine

Stefan MacGill Président de  
ILEI

[stefan.macgill@gmail.com](mailto:stefan.macgill@gmail.com)

Pannonia u. 30.I.6, HU-1136  
Budapest,

Tel : (+36 1) 349 5207 –  
Hongrie.

2010 Matanzas Cuba

2011 Copenhague  
Danemark

Dans nos dernières  
réalisations :

Le conte des feuilles de taro  
(Afrique).

Inter niaj lastaj realigaĵoj :

Rakonto pri tarofolioj (Afriko).

Nder punet ton ate bera:

Tregim per tarofolio (Afrikane)

INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO

CENTRO de KONSTANTA EDUKADO en BYDGOSZCZ

KLERIGEJO DE LA INTERNACIA AKADEMIO DE LA SCIENCJOJ (AIS)

STR. M.SKŁODOWSKIEJ-CURIE 10, PL-85-094 BYDGOSZCZ tel./fax: (+48-52)346-11-51

<http://www.esperanto-studium.za.pl> <http://www.esperanto.bydgoszcz.eu>

e-poŝto: [stud-esperanto@wp.pl](mailto:stud-esperanto@wp.pl) [stud@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:stud@esperanto.bydgoszcz.eu)

## STUDU KAJ LABORU – NOVAJ STUDEBLECOJ EN BYDGOSZCZ

Nun ankoraŭ estas novaj studadeblecoj en Bydgoszcz. Studentoj ĉe Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz, kiuj bone konas Esperanton, havos eblecon perlabori monon por sia studado, vivkostoj en Bydgoszcz kaj eksterlandajn praktikojn. ISTK – studdakotizoj estas 400 EUR por la studjaro 2011/2012.

Eblas ankaŭ samtempe studi ĉe Ekonomia Universitato en Bydgoszcz (EUB). Tiucele aliĝinte al ISTK-studado kaj paginte 400 EUR eblas ankaŭ ricevi invitilon – konfirmon por pola vizo de Ekonomia Universitato, kiu ebligas ricevi ankaŭ vizon – restadkarton ebligantan akiri laborpermeson en Pollando. En Ekonomia Universitato eblas studi en 18 fakoj kun 50 specialecoj en pola lingvo aŭ en kelkaj fakoj en angla au rusa lingvoj. La tutjaraj studadkotizoj por 2011/2012 ĉe Ekonomia Universitato en Bydgoszcz estas 1000 EUR por studado en pola lingvo aŭ 2000 EUR por studado en angla au rusa lingvoj. Tiuj aldonaj kotizoj de Ekonomia Universitato estas pagendaj post la alveno al Bydgoszcz, kiam Vi elektos fakon kaj lingvon de studado.

NI INVITAS AL STUDADO DE TURISMO, KULTURO KAJ LINGVOJ en la jaroj 2011/2012. Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo Centro de Konstanta Edukado estas Klerigejo AKB/AIS funkcianta ekde 1991, laŭleĝe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 13/08). En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB), Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz (UKW) kaj Muzeo de Diplomatio, Grandpolia Altlernejo de Turismo kaj Administrado en Poznań, Ekonomia Universitato en Bydgoszcz (WSG-EUB), Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodio Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkona Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo „Kujavio kaj Pomerelio”, Pola Esperanto-Asocio kaj Oficejo de Vojaĝantoj „Flugo”. En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon (maturec-ekzamenon) kaj bonan san-staton. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn kaj permesas akiri sciojn necesajn por labori en naŭ profesioj (simboloj de Eŭropa Unio):

post la 1-a studjaro - akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj aranĝoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (422104), oficisto en jaĝagentejo (422103) kaj internacia vojaĝgvidanto (511301);

post la 2-a studjaro - kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta keramiko; profesioj/postenoj: organizanto de turisma priservado (341401), regiona turisma ĉiĉerono (511304) kaj animanto de kultura agado (347601);

post la 3-a studjaro - profesioj/postenoj: kursgvidanto de Esperanto (235910), specialisto pri



organizado kaj disvolvo de turismo (241915) kaj specialisto pri organizado de kulturo - kulturscianto (244103); ev. titolo de bakalaŭro de AIS /Akademio Internacia de la Sciencoj/ pri humanistiko aŭ morfosciencoj.

Laŭ dekreto de la pola Ministro pri Edukado de la 1-a de aŭgusto 2000 j., kiu estis publikigita en la ŝtata leĝ-jurnalo — fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto, kiu estas grava rekono de Esperanto en turismo. En la jaroj 2011/2012 kadre de la Studumo oni planas kunlabore kun Universitato de Kazimiro la Granda kaj aliaj altlernejoj kaj instru-institucioj, krome Oficejo de Vojaĝantoj „Flugo”-gvidadon de specialigitaj kursoj pri turismo, kulturo kaj bizneso kaj ankaŭ konversaciajn lingvokursojn. Eblas ankaŭ partopreni semajnajn kursojn kun studentoj de ISTK/AKB—prezo 10 EUR+loĝado en studenta domo po 10 EUR/nokte, do entute 60 EUR semajne kun 5 tranoktoj. Kunlaboro kun AIS – Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj kun sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branĉoj de scienco kaj kulturo-i.a. pri ekologio, eŭrologio, etnologio, etnografio, ceramiko, kultur-kaj soci-geografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, diplomatio, komerco, merkato, estrado, kaj de pluraj lingvoj. La studado okazas laŭ Bolonja-sistemo – necesas akiri po 150 kursojn/studunuoj por bakalaŭro kaj magistro de AIS – Akademio Internacia de la Sciencoj.

En Bydgoszcz la studjaro 2011/2012 komenciĝis per la 36 Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kun 38 Sesio de AIS Klerigejo Bydgoszcz (AKB) dum 16-22 de septembro 2011, okaze de Monda Tago de Turismo (27.09) kaj Europa Tago de Lingvoj (26.09). Dum 10-18.12.2011 okaze de Zamenhofaj Tagoj en Bydgoszcz kaj Torun okazos Internacia Pedagogia Esperanto – Kurso, kiu ebligas ricevi ateston por Instruado de Esperanto.

Ĉefan kurson pri Interkultura edukado en la mondo gvidos d-ro Przemyslaw Pawel Grzybowski el Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz. La studjaro 2011/2012 daŭros ekde septembro ĝis majo kaj ampleksos: laŭ ĉiutaga sistemo po 30-40 studhoroj semajne (ferioj decembre kaj januare), kaj laŭ t.n. eksterĉeesta sistemo — la stud-ekzamenajn : Internacian Kurson por vojaĝgvidantoj dum 21-26.04.2012 kun 41 AKB/AIS Sesio, kadre de 37 Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz dum 21-26.04.2012. Necesas partopreni almenaŭ finekzamenan 41 AKB/AIS-Sesion dum 21-26.04.2012 ankaŭ kun Internacia Kurso por Esperanto – vojaĝgvidantoj kaj Internacia Pedagogia Kurso. Eksterĉeestaj gestudentoj povas ankaŭ partopreni, sen krompago, libere elekteblajn kursojn ekster la sesioj.

Dum la jaroj 1991–2011 lecionojn en la Studumo gvidis lekciistoj el 60 landoj de Eŭropo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio por gestudentoj el 90 landoj de la mondo. La plej ofte uzataj lingvoj en la Studumo, apud la pola kaj Esperanto, estis: angla, hispana, franca, litova, ĉina, albana, itala, kazaĥa, mongola, germana, rusa, portugala kaj svahila. La gestudentoj konatiĝis tiel pri kulturo kaj lingvoj de diversaj nacioj, kaj fremdlandanoj ankaŭ pri la pola. Okazis ankaŭ Internacia Festivalo de 36 lingvoj. La instruado en ISTK nun okazas en Esperanto kaj pola lingvoj, ankaŭ parte en angla, germana, hispana, litova kaj rusa lingvoj. Nun la studkotizoj por la studjaro 2011/2012 estas samaj por ambaŭ sistemoj – 400 EUR aŭ 400 USD. Kaze de enpago kaj neeblo alveni la kandidato povas prokrasti la studentigon ĝis la sekva studjaro (t.e. 2012/2013), studentigi anstataŭe alian personon el la sama aŭ alia lando, aŭ – se eblas – utiligi la pagon por internaciaj vojaĝoj de la Internacia Klubo „Esperantotur”; resendo de la mono

ne eblas. Eblas ankaŭ aliĝi por Kursoj de Pola Lingvo en Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz(UKW) dum 2011/2012, kio kostas aldone 400 EUR. La kurso ebligas lerni la polan lingvon tiugrade, ke oni povos aliĝi por 2012/2013 ankaŭ al studado ĉe Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz ĉu por studi geografion kaj turismon, ĉu aliajn fakojn en la Universitato. Tiamaniere, studente en Bydgoszcz eblos samtempe akiri kvar diplomojn: de ISTK, bakalaŭran kaj magistran de AIS kaj magistran de la Universitato de Kazimiro la Granda (UKW) en Bydgoszcz. Aldone eblas krome aliĝi por Internacia Kurso pri Diplomatio, kiun gvidos dum 2011/2012 OProf.dr hab. Adam Sudoł-Prezidanto de Societo de Diplomatio-Amantoj kaj Historio de Migrado "Pro Diplomatio" samtempe Direktoro de Muzeo de Diplomatio ĉe Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz. Aldona pago estas 200 EUR, do kun ISTK studado 2011/2012 estos 600 EUR aŭ ISTK studado 400 EUR + kurso de pola lingvo ĉe UKW-Universitato 400 EUR = 800 EUR kaj aldone Internacia Kurso pri Diplomatio – 200 EUR – entute 1000 EUR. Por 2011/2012 eblas ankaŭ aliĝi por novaj internaciaj kursoj cxe ISTK pri komerco au por Internacia Studumo pri Kono de urbo Bydgoszcz – ambau aldonaj kursoj kostas po 200 EURO pagendaj al ISTK en Bydgoszcz.

Aliĝojn akceptas la sekretario de la studumo (adreso supre); la studkotizojn por 2011/2012 oni pagu al bankkonto:

Bank Pocztowy SA O/Bydgoszcz, Konto n-ro (IBAN): PL80 13201117 2034 0100 2000 0001,

SWIFT kodo POCZPLP4 por Internacia Centro

Grave: sen studpagoj ne eblas ricevi inviteletojn, se la aliĝinto ilin bezonas por akiri polan vizon. Pli facile eblas ricevi vizojn aliĝante samtempe al ISTK + UKW – studado au ISTK + EUB - studado.

Organizantoj de minimume 10 personaj grupoj povas studi senpage kaj ankaŭ perlabori monon pro ilia laboro kun tiuj grupoj zorgante pri ili, ankaŭ instruante Esperanton, turismon kaj kulturon.

La modestaj viv-kostoj en Bydgoszcz (loĝado en studentaj domoj) estas ekde 200 USD aŭ 150 EUR ĉiumonate laŭ postuloj de Schengen - landoj - kaj kun manĝado 300 USD aŭ 250 EUR tiujn kostojn oni povas pagadi surloke.

Gestudentoj de la Studumo povas ankaŭ studentigi ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj (krom-kosto 32,50 EUR), kio rajtigas al 75% rabato de kromaj kurset- kaj ekzamen-kotizoj de AIS en Bydgoszcz aŭ aliloke en centra/orienta Eŭropo — kaj al ĉiuj fin-studentoj permesas akiri la titolon de bakalaŭro, kaj, post pliaj du studjaroj, ankaŭ magistro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) pri humanistiko aŭ morfosciencoj.

Dum 2006/2007 en ISTK en Bydgoszcz studis 132 gestudentoj el pli ol 20 landoj kaj 4 kontinentoj kaj pli ol 70 gestudentoj dum 2007/2008 kaj 2008/2009 kaj ankaŭ pli ol 80 por 2009/2010 kaj pli ol 130 por 2010/2011 de la tuta mondo. Por 2011/2012 jaroj aliĝis jam al ISTK pli ol 70 gestudentoj el Afriko, Azio kaj Eŭropo. Bonvenon al nia Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz(AKB), kiu estas la unua en la mondo, kie oni ĉiutage instruas en Esperanto!

Direktoro de ISTK

Prezidanto de la Program-Konsilio de ISTK

(—) mag. Wojciech Rumiński

(—) ASci. mag. Andrzej Grzębowski

Modelo de la ALIĜILO – uzu apartan folion

por Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en 2011/2012

aŭ por kursoj ..... en ISTK en 2011/2012

aŭ por vojaĝoj de Internacia Klubo „Esperantotur“, datoj, landoj, itineroj

.....

FAMILINOMO:

.....

Nomoj:

.....

Naskiĝdato kaj loko:

.....

Plena poŝta adreso: .....

.....

Tel./ fakso/ e-mail:

.....

Finita lernejo-akirita edukado:.....

Dato: ..... Subskribo: .....

## ALIĜILO

Mi aliĝas ( jes / ne ) ankaŭ al Internacia Centro pri Turismo kaj Kulturo – Internacia Klubo „Esperantotur“ en Bydgoszcz pagante la trijaran membrotizon: 20 EUR aŭ 10 EUR (studentoj, pensiuloj, neplenlertaj) al la banko konto:

PL 80 13201117 2034 0100 2000 0001, SWIFT kodo POCZPLP4 por Internacia Centro, dank'al tio mi rajtas ricevi 15% rabatojn de la Esperantotur prezoj kaj de la studadkotizoj de Internacia Studmo pri Turismo kaj Kulturo /ISTK/.

INTERNACIA CENTRO PRI KULTURO KAJ TURISMO, INTERNACIA KLUBO „ESPERANTOTUR“

str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando, [www.esperanto.bydgoszcz.eu](http://www.esperanto.bydgoszcz.eu)

tel/fakso (+48-52) 346-11-51, stud-esperanto@wp.pl , stud@esperanto.bydgoszcz.eu

BANKA KONTO: PL 80 1320 1117 2034 0100 2000 0001, SWIFT kodo POCZPLP4 por Internacia Centro

Afiŝo de brazilaj esperantistoj

**Luiza Carol (Israel)**  
Profesora de inglês e de piano. Escreve e traduz literatura em esperanto e outras línguas. «Além da minha língua natã, só em esperanto me comunico não sentindo que se trate de uma língua estrangeira, mesmo quando falo ou escrevo com pessoas de culturas muito diferentes.»

**Cindy McKee (E.U.A.)**  
«Estudei eletrônica porque quis compreender como funcionam os circuitos e quis desenhá-los. Estudei esperanto porque quis compreender os outros, e como funciona a comunicação em plano de igualdade à escala mundial. Com surpresa, vi que em esperanto também tenho o direito de desenhar. Agora desenho, de plano direto, as minhas palavras.»

**Emerson Werneck (Brasil)**  
Linguista, tradutor, jornalista e professor de línguas. Mestre em linguística, bacharel em inglês e japonês. «Por meio do esperanto, já viajei por toda a Escandinávia, visitei o Japão, e ganhei amigos em mais de 30 países.»

**Zhang Manjuan (China)**  
Secretária numa empresa ferroviária. «O esperanto levou-me a Cuba e mostrou-me outro mundo fora da China. Através de esperanto tenho acesso a outras literaturas e a novos amigos.»

**Aminda Ebegbo (Togo)**  
Aluna do ensino secundário. Colabora na associação de esperanto do seu país. «O esperanto facilita a aproximação entre as pessoas. Ao comunicar com esperantistas, compreendo como vivem as pessoas fora do meu país.»

**Aleksandro Mijic (Rússia)**  
Licenciado e mestre em química. «O esperanto é uma língua única, que pode ser aprendida a traduzir poemas. O esperanto abriu-me portas para aprender outras línguas, o que vou continuar a fazer.»

**Gerrit Berveling (Holanda)**  
Membro da Academia de Esperanto. Professor e pastor remonstrante. Ensina latim e grego. Traduz destas línguas e do holandês para esperanto. «Viu o esperanto principalmente para ler sobre culturas menos acessíveis, como, por exemplo, a japonesa, a chinesa e a húngara.»

**Amir Febri (Irão)**  
Jornalista. «O esperanto não é só uma língua, mas um tesouro escondido, uma chave que abre todos os corações. Ele é uma esperança para todos os que se cansaram da dificuldade das línguas, uma nova janela aberta para o mundo.»

**João José Santos**  
**O Esperanto é fixe!**  
PT "fixe" = BR "bacana"  
curso de iniciação à língua internacional para jovens

Novo Acordo Ortográfico da Língua Portuguesa  
Quadro Europeu Comum de Referência para as Línguas  
(QECR - A.1.1. - A.1.2. - A.2.1. - A.2.2.)

[www.lakaravelo.net](http://www.lakaravelo.net)

IF-informilo, novembro 2011

Karaj geamikoj,

finigxas novembro kaj en malpli ol 5 semajnoj komencigxos nia 28-a IF ...

Cxu vi deziras aligxi kaj pasigi kun ni la jarfinajn tagojn?

Gxis 30 novembro vi gxuas ankoraŭ rabatitan kotizon!

Bonvolu utiligi nian elektronikan aligxilon.

Detalojn pri IF, la urbeto Xanten kaj la ekskursita tago (al nederlanda Nijmegen) vi povas legi en niaj interretaj paĝoj [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de)

Ni ofertas al vi ampleksan programon, kutime 2 - 3 paralelajn programerojn - unu programero ĝenerale rilatas al la kadra temo (ĉi-jare: Benelukso), la aliaj informas pri diversaj temoj kaj/aŭ ofertas ankaŭ promenojn (urbo kaj arkeologia parko, novjara promeno k.a.). Ĉiu do povas elekti dumtagan program-oferton laŭ persona gusto. Kaj ... vespere ni prezentos al vi agrablajn horojn kaj vesperojn.

Ni gxojas pri via aligxo kaj partopreno! Gxuu klerigajn kaj distrajn tagojn en nia sxatata arangxo, gxojn pri nia silvestra bufedo kaj -balo kaj pri la vesperaj babiladoj kun geamikoj en nia etosoplana kafejo (Knajpo).

Certe vi gxuos, bonvenon!

Koran bonvenon al vi!

Elkore salutas vin

Hans-Dieter Platz

(IF-organizanto)

AVENO / savi hejon de elefantoj/ pli danĝere en Fukushima kaj Bavario / agrikulturo / Apple ...

From: Manfred Westermayer <[manfred@westermayer.de](mailto:manfred@westermayer.de)>

Karaj geamikoj,

jen post iom da tempo denove subskribo-peto por iu pra-arbaro, kaj kelkajn informojn rilate atomkatastrofojn. Necesas redukti la konsumadon da resursoj kaj alia energiopolitiko.

Bondezirojn, amike, manfred

Aveno 2011-10-30

Bonvolu subskribi kontraŭ la forhakado de protektita praarbaro en Sri Lanka. La filio Letsgrow de la banano-konzerno DOLE-Food jam forhakigis 1 500 hektarojn en la Nacia Parko Somawathie. Tie vivas 400 aziaj elefantoj kaj multaj aliaj specioj. Bonvolu subteni la medioprotektantojn en Sri Lanka.

(de, en, es, fr, pt) <http://www.regenwald.org>

---

Post legado de libroj pri bontenado de la grundo, kaj de "Plano B" mi kompilis la AVE-Konsilojn pri agrikulturo (kiuj kompreneble ne estas kompletaj):

<http://www.verduloj.org/dokument.htm>

Pri kooperativa kaj organika agrikulturo en Afriko:

<http://www.globidar.org/globe/solidareco.htm>

-----

Naturmedia Instituto en Munkeno mezuris altan radioakticecon en sudbavariaj fungoj - pro la atomkatastrofo de Chernobilo 1986.

Bruna boleto (de: Maronenroehrling) Cs-137: la plej alta valoro estis 2500 Bq/kg (Oktobro 2011)

Tiaj fungoj aparte bone kolektas Cezion.

(<http://www.umweltinstitut.org>)

----

Japanio: la registaro taksas 20 mSv/jare kiel tolerebla ech por junaj infanoj;

en Germanio tiu-chi 20 mSv/jare estas la maksimuma valoro por profesiuloj en radioaktiva areo.

Intertempe oni montras mezureblajn kvantojn da Stroncio ech en Yokohama kaj Plutonio en distanco de 80 km de Fukushima.

Oni planas purigi granda areon, 8000 km<sup>2</sup> (do, 90 km \* 90 km) pere de formeto de 5 cm de la grundo.

Sed oni ne scias kien meti tiun amaso da radioaktiva grundo.

--

Fukushima: pluraj fisio-produktoj eliris tuj post la tertremo.

Jam antaŭ la csumamo eliris radioaktiva Ksenono Xe-133 el kelkaj reaktoroj.

Tio konfirmas la ideon, ke la reaktoroj estis detruitaj jam de la tertremo.

La kalkulia kvanto estis 16 700 PBq (Peta Bekerel) Peta = 10<sup>15</sup> (biliardo)

Tio estas pli ol duoblo de la elsendo en Chernobilo.

La duondaŭro estas nur 5,25 tagoj - do, rapide disfalas beta-radiante, kaj ighas Cs-133 kio estas stabila elemento. Tamen se oni enspiras ghin, ghi radias en la korpo.

Inter la 12a kaj 20a de Marto pro la hidrogen-ekslodoj estis elsenditaj grandaj kvantoj da radioaktiva kaj san-danghera Cezio-137, kiuj grandparte falis per la pluvo al la tereno de Honshu/Japanio, kaj ankau en la maron.

Tiu-chi kvanto egalas al ch. 40% de tiu el la reaktoro 4 de Chernobilo.

Pli che: <http://www.ippnw.de>

(dank al Franz Alt, 2011-10-23 & 30 (de) <http://www.Sonnenseite.com> - Fukushima)

-----

2011-10-09 Apple denove kun iPhone, kie la uzanto ne povas mem shanghi la akumulatoron !

Unuflanke la mondo funebras pro la morto de la genia Steve Jobs, aliflanke, necesas kritiki la praktikon de Apple, kaj de aliaj firmaoj kiuj agadas kontraŭ longdaŭra uzado de iliaj aparatoj; ekz-e per fiksa enmeto de baterio, kio ne estas intershanghebla de la uzanto.

(lau Franz Alt, [www.sonnenseite.com](http://www.sonnenseite.com) , [www.duh.de](http://www.duh.de))

ps:

DUH ofertas reprenon au ech acheton de malnovaj mobil-telefonoj, por reuzi ilin au almenau recikli la resursojn optimale.

<http://www.handysfuerdieumwelt.de/wirkaufens/>

ESPERANTO-RONDO DE ALP-ADRIO

Kunordiga Centro: TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Via del Coroneo 15 - 34133 TRIESTE TS – ITALIO

Tel. kaj fakso 0039-040-350093 /@-poŝto: [esperantotrieste@yahoo.it](mailto:esperantotrieste@yahoo.it)

Sekretario: Edvige Tantin Ackermann / @-poŝto: [noredv@teletu.it](mailto:noredv@teletu.it)

Triesto, 4 decembro 2011

Al Estraro kaj E-grupoj

Estimataj Alp-Adrianoj,

lastofoje ni renkontiĝis en Triesto por la 15-a Konferenco de nia Rondo (2005): pasis iom da jaroj, ĉu ne? Bedaŭrinde neniuj grupo ĝis nun sinanoncis por organizi tiun nian tradicion aranĝon, sed post pozitivaj interparoloj kun pluraj esperantistoj kaj okazigo samtempa de tre grava Internacia Konferenco en Triesto kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio, TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO opinias oportune organizi nian 16an kunvenon kiel sekve:

📅dato: 9-12 de majo 2012

📅temo: Alp-Adria Laborkomunumo, plua eŭropa engaĝigo

📅programo (ankoraŭ plibonigenda ... ankaŭ per viaj eventualaj sugestoj!)

📅Partopreno en la internacia konferenco pri la temo: “Kiel estus Eŭropo komence de la 21a jarcento, se Eŭropa Unio ne ekzistus?”

☞Asembleo de la Alp-Adriaaj grupoj

☞Komuna festa manĝo

☞Turismaj vizitoj

Bonvolu informi nin pri via ebleco partopreni kaj, precipe, disvastigi la aranĝon inter viaj E-grupoj kaj landoj. Pliaj detaloj pri partopren-kostoj sekvos kiel eble plej baldaŭ. Aliĝo estas senpaga.

Bonvolu kiel eble plej rapide kontakti nin, ĉu per ordinara poŝto ĉu per @-poŝto (noredv@teletu.it kaj testudo.ts@gmail.com )

Korajn salutojn,

Edvige Ackermann

Kelkaj pliaj informoj pri la Internacia Konferenco troveblas ĉe la ttt-ejo de Eŭropa Esperanto-Unio, sub “Konferencoj” (<http://www.europo.eu/eo/konferencoj>)

Nia propagando

Gazetara komuniko de UEA

Tra la tuta mondo nun ekzistas homoj pretaj informi ĵurnalistojn, televidon, radion ktp pri nia Jubilea Jaro : Esperanto 2012. [http://uea.org/vikio/Landaj\\_kaj\\_fakaj\\_asocioj\\_kunlaborantaj](http://uea.org/vikio/Landaj_kaj_fakaj_asocioj_kunlaborantaj). Se ni ĉiuj ion faros, ni multon atingos.

Mi nun sendas la unuan taskon kaj petas vian helpon. Ni volas sendi Gazetaran komunikon dum Decembro.

La teksto troviĝas ĉi-tie. [http://uea.org/vikio/Komunikoj\\_al\\_la\\_gazetaro](http://uea.org/vikio/Komunikoj_al_la_gazetaro) Bonvole notu ke tio estas nur ebla bazo por komuniko kaj necesos traduki tion al via nacia lingvo. Se vi ne ŝatas la enhavon faru alian ; poste dissendu al televido, ĵurnalistoj ktp. Nepras tamen la temo.

Nepras informi ke Esperanto, la plej juna lingvo en la mondo, fariĝos 125-jara dum 2012.

Horst Vogt el Germanio desegnis leterkapan paperon en la germana lingvo – al kroĉigatan – eble helpos vin redeseĝni tion kun traduko en vian propran lingvon de la vorto “Gazetara komuniko” (germane = pressemitteilung). Se vi komunikas al ĵurnalistoj rete bonvole ankaŭ aldonu ligilojn ekzemple klaku ĉi-tie kaj ĉi-tie



Sukceson en via laboro

Brian.

La teksto en la Albana:

Njoftim për gazetata

Esperanto, gjuha më e re ne botë do bëhet 125 vjeçe vitin që vjen. Esperanto është Gjuha Ndërkombëtare e krijuar në Poloni në vitin 1887, nga dr Ludwig Zamenhof. Ajo është krahasimisht e lehtë në të nxënë, njihet gjerësisht dhe përdoret zyrtarisht.

Është shumë e përdorur në internet dhe në turizëm, por ka edhe një letërsi origjinale të madhe. E përdorin edhe në teatër, kinema dhe muzikë. Radio-stacione në Brazil, Kinë, Kubë dhe Vatikan japin emisione rregullisht në Esperanto dhe shumë programe mund të kapen me internet.

Pas një periudhe të shkurtër prej vetëm 124 vitesh, Esperanto listohet në 100 gjuhët më të epërme nga 6800 gjithsej që janë në botë. Ajo është gjuha e 27-të e përdorur në Vikipedi dhe është gjuhë e zgjedhur te Google-, Skype, Firefox, Ubuntu dhe Facebook.

Gjuha është në përdorim të përditshëm në mbarë botën, përfshi rajonet në rritje në Azi dhe Afrikë. Organizata botërore e Esperantos ka lidhje këshillimore me Organizatën e Kombeve të Bashkuara dhe me Këshillin e Evropës. Përdorimi në rritje i Esperantos duket edhe në emisionet në këtë gjuhë të Televizionit kinez dhe nga përdorimi i saj për lajmërim nga kompania britanike British Telecom. Qeveria britanike ka punësuar gjithashtu përkthyes të Esperantos.

Ndër folësit që në lindje të Esperantos ( d.m.th. njerëzit që e përdorin gjuhën që në lindje) është edhe Susan Polgar, kampione botërore e shahut, Ulrich Brandenburg, ambasadori i ri gjerman në Rusi, dhe nobelisti Daniel Bovet. Financieri George Soros e ka mësuar Esperanton në fëmëni.

Esperanto po bëhet gjithnjë e më shumë popullore. Faqja e re e madhe në internet <http://www.lernu.net> ka 125 000 klikime në ditë dhe Vikipedinë në Esperanto e klikojnë 400 000 herë në ditë.

Deputitoj favoraj al Esperanto

Franciszek Witucki

To: fr.witucki@onet.pl

Sent: Friday, October 14, 2011 2:39 PM

Jen "bonaj informoj pri Esperanto" post la finita balotkampanjo al Pola Parlamento (Sejmo kaj Senato). Mi esperas, ke la alkrochita teksto inspiros vin trovi politikistojn favorajn al Esperanto. Bonvolu profiti de la informoj, kiujn ni jam pri la temo kolektis. Ni petas antaŭ la planita renkontigo kun politikisto kontakti nin por eviti la eventualajn duobligojn kun la samaj politikistoj - kompreneble okaze de la kontakto ni sendos al vi E-materialojn, kiujn valorus transdoni kaj parte ech prezenti dum la persona kontakto kun la politikisto.

Bonvolu uzi jenan nian ret-adreson: [polskie.ede@gmail.com](mailto:polskie.ede@gmail.com)

Baldaŭ estos preta nia ttt-ejo: [www.esperanto.info.pl](http://www.esperanto.info.pl)

Elkorajn salutojn kaj antaŭdankon pro la eventualaj rimarkoj, sufloroj kaj kritikoj de nia agado.

Witucki Francisko - Prezidanto de EDE-PL

Bona informo por Esperanto (legu sube)

En Pollando ĝis hodiaŭ estas sume 16 senatanoj en Senato kaj parlamentanoj en Sejmo favoraj por ESPERANTO,

kaj okaze alvoko al ĉiuj polaj esperantistoj kiuj ne estas kontraŭ la personaj kontaktoj kun politikistoj, speciale kun parlamentanoj kaj senatanoj por konvinki ilin al Esperanto - same kiel agas la anoj de la Pola Societo EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) (legu sube).

POLA SEJMO (parlamento)

1. Tadeusz Tomaszewski - parlamentano favora por Esperanto eniris Polan Sejmon (parlamenton), li dum la 2a GES en Wągrowiec promesis fondi en la nova, do la nuna parlamento kaj registri ĉe Prezidanto de Pola Sejmo la oficialan Parlamentanan Grupon de E-amikoj (sed atento: estas bezonata minimume 15 persona grupo - do ni strebu por trovi ankoraŭ minimume 5 parlamentanojn en Sejmo favorajn por Esperanto kaj pretaj por esti anoj de la oficiala Parlamenta Grupo de E-amikoj) kaj kompreneble Tadeusz Tomaszewski pretas gvidi la grupon kaj regule, ekz. ĉiu-kvaronjare kontaktiĝi kun EDE-PL en la sidejo de Pola Sejmo, do havi la konstantajn kontaktojn.

Kaj krome 4 aliaj parlamentanoj favoraj por Esperanto (de Alianco de Demokratia Maldekstrularo) same eniris Polan Sejmon:

2. Łybacka Krystyna Maria - eks-ministrino pri edukado, en majo 2011 preparis kaj prezentis por Esperantan interpelacion en Pola Sejmo kaj renkontiĝis kun EDE-anoj Francisko Witucki, Kazimiro Krzyżak kaj Eduardo Kozyra en sia parlamenta oficejo en Poznań, krome tre aktiva por prepari la faman rezolucion de Pola Sejmo favoran por Esperanto en la jaro 2008.

3. Wenderlich Jerzy Jan - Alta Protektanto de 2a GES en Wągrowiec kaj krome korespondis pri Esperanto kun EDE-ano Krzyżak antaŭ kaj prepare por la fama rezolucio de Pola Sejmo favora por Esperanto en la jaro 2008.

4. Iwiński Tadeusz - korespondis pri Esperanto kun EDE-ano Krzyżak antaŭ kaj prepare por la fama rezolucio de Pola Sejmo favora por Esperanto en la jaro 2008.

5. Aleksandrak Leszek Grzegorz - gvidis kiel ĉiĉerono la E-delegacion tra sidejo de Pola Sejmo kaj kunorganizis ĝian renkontiĝon kun Vic-Prezidanto de Pola Sejmo Jerzy Szmajdziński.

„SLD (Sojusz Lewicy Demokratycznej) Alianco de Demokratia Maldekstrularo (AdDM) Democratic Left Alliance polit. Sojusz Lewicy Demokratycznej (SLD)”

Same de Civitana Platformo eniris Polan Sejmon jenaj parlamentanoj favoraj por Esperanto:

6. Biernacki Marek - oficiale partoprenis plantadon de la slovena vito kaj inaŭguron de E-memorŝtono "Slovenio" en Malborko, kaj kelkfoje renkontiĝis kun EDE-anoj Krzyżak kaj Kozyra en lia parlamenta oficejo en Gdynia por diskuti pri la E-temo.

7. Orłowski Paweł - danke al la persona renkontiĝo kun EDE-anoj Kazimiro Krzyżak kaj Kozyra en lia parlamenta oficejo en Malborko, li aktive helpis EDE-PL en la akiro de la Ŝtata Ordeno por Etsuo Miyoshi pro la E-agado, atribuita de Prezidento de Pollando Bronisław Komorowski.

8. Nowak Sławomir - nun pere de li EDE-PL provas aranĝi en Prezidenta Palaco en Varsovio la renkontiĝon de Etsuo Miyoshi kun Prezidento de Pollando Bronisław Komorowski decembre 2011.

„PO (Platforma Obywatelska) Civitana Platformo Civic Platform polit. Platforma Obywatelska (PO)”

Same de Juro kaj Justeco eniris Polan Sejmon jena parlamentano favoraj por Esperanto:

9. Sellin Jarosław - en sia parlamenta oficejo en Gdynia renkontiĝis kun EDE-anoj Krzyżak, Kozyra kaj kun alta oficisto en Eŭropa Parlamento s-ano Michael Cwik (esperantisto), el Bruselo.

„PiS (Prawo i Sprawiedliwość) Juro kaj Justeco Law and Justice polit. Prawo i Sprawiedliwość (PiS)”

Same de Movado de Palikot eniris Polan Sejmon parlamentano favora por Esperanto:

10. Kotliński Roman - en sia redakcio kiel ĉefredaktoro akceptis EDE-anojn Krzyżak, Witucki kaj Kozyra kaj en sia gazeto kelkfoje publikigis artikolojn de Kazimiro Krzyżak pri Esperanto.

„RP (Ruch Palikota, Ruch PL) Movado de Palikot Palikot's Movement polit. Ruch Palikota, Ruch PL (RP)”

SENATO

Jen senatanoj favoraj por Esperanto:

1. Borusewicz Bogdan (PO - Civitana Platformo) - la Prezidanto de Pola Senato – li estis la Alta Protektanto de Ago-Semajno '07 en Malborko kaj Alta Protektanto de Oficiala Post-kongreso de UEA '09 en Malborko.

2. prof. d-ro Wittbrodt Edmund (PO - Civitana Platformo) - post la korespondado pri Esperanto kun EDE-ano Krzyżak la senatano invitis EDE-anojn Krzyżak kaj Kozyra. Dum la renkontiĝo li donis tre interesan proponon, ke ni organizu E-kurson por senatanoj komence de 2012 jaro kaj ke li persone konvinkos kelkajn senatanojn por la kurso. Lige kun tio ni proponis al Arek Zychewicz, ke ĝuste li gvidu la E-kurson por senatanoj, kompreneble se sukcesos al prof. Wittbrodt kaj eble ankaŭ al ni trovi interesitojn inter la novelektitaj senatanoj. (Ni aldonu, ke prof. Wittbrodt estis: en Senato en la jaroj 2005-2011 Prezidanto de la Komisiono pri Eŭropa Unio; 2000-2001 Ministro pri Edukado; 1990-1996 Rektoro de Gdanska Politekniko).

3. Zaborowski Roman (PO - Civitana Platformo) - ĝis fino de 2011 Pomeria Vojevodo kaj ĝuste kiel vojevodo apogis niajn strebojn en la akiro de la Ŝtata Ordeno por s-ano Etsuo Miyoshi pro la E-agado de atribuita de Prezidento de Pollando Bronisław Komorowski - ĝuste en tiu afero li persone akceptis la 4an de majo 2011 EDE-anojn Krzyżak kaj Kozyra en sia oficejo. (Ni aldonu ke: en la formularo de la Kapitulo de la Ordeno estis necesa opinio de la loka vojevodo kaj ĝuste plenumis ĝin bonege Roman Zaborowski, krome li estis kuninaŭgurinto en Parko de la Mondo en Malborko de la E-memorŝtono "KAŜUBIO".

4. Czarnobaj Leszek (PO - Civitana Platformo) - Kiel la ĝisnuna Vic-Prezidanto de la Pomeria Sejmeto lin renkontiĝis kun Eduardo Kozyra kiu tiam estis kunorganizanto de Ago-Semajno '07 en Malborko kaj rezulte Pomeria Sejmeto finance helpis la menciitan E-aranĝon.

5. Jackowski Jan Maria (PiS - Juro kaj Justeco) - Eks-Prezidanto de la Komisiono pri Kulturo en Pola Sejmo, li estas frato de konata esperantistino el Szczecin d-rino Jackowska Maria Teresa, kelkfoje persone kontaktiĝis kun Eduardo Kozyra i.a. pri Esperanto kiam ili kune en la sama listo en Pomerio kandidatis en la jaro 2005 en la balotoj al Pola Sejmo de la listo de Ligo de Polaj Familioj.

6. Cimoszewicz Włodzimierz - Eks-Ĉefministro de Pola Registaro kaj Ministro de Eksteraj Aferoj; krome la Honorkomitatano de la UK en Bjalistoko '09 kaj persone partoprenis la inaŭguron de la kongreso.

La araba alfabeto kaj ortografio

2011/11/28 HUSSAIN AL-AMILY

<abumalik@btinternet.com>

Estimataj,

asw ad	Asw ad	black	Arabic
-----------	-----------	-------	--------

Char videbla listanoj etendas komentojn al diversaj lingvaj ortografioj, mi kuraghis afishi la jenan pri la araba ortografio, kiu eble interesos kelkajn:

Pri la araba alfabeto (\*)

1. Chu china, chu angla, chu aaba, skribita litero au vorto estas nur BILDO. Ju pli geometrie malgranda kaj simplformaj la bildoj, des PLI RAPIDE oni povas alrigardi kaj legi ilin dum pli malgranda ekvido - sekve, pli grandan tekston en ekvido.

2. Senregarde al la formo de vorto, infanoj lernas la respektivajn sonojn de tiuj vortoj jam en la lernejo, hejmo au en la strato - do chi tie ne necese fonetika ortografio, (tiel ekz-e legas la anglaj kaj francaj infanoj). Sekvas, ke ia ajn VOKALIGADO (au ech sen ghi) por adolta legado (ekz-e en frazeologia parto de "Pitman"-stenografio - mi ankoraŭ uzas ghin) kutime ne estas necesa.

3. La araba literaro estas GEOMETRE malgranda. Tiurilate konformas la respektivaj vortoj kaj ties frazoj, kio denove signifas ebligon de pli rapida legado au skribado.

4. Char la araba literaro plejmulte estas REKTAJ LINIOJ, KURVOJN kaj CIRKLOJN, tial oni povas pli facile kaj glate "ruli" fingrojn - ankau malofte levi la manon - (de) sur papero.

4. La araba literoj havas ghenerale po UNU SAMAM FORMON, kaj por manskribado kaj por printado, (neniuj majuskloj kaj minusklo; la romana alfabeto havas kvar formojn.)

5. Kun la tri longaj vokaloj: A, U, I (prononcite

same kiel en Esperanto) kaj ties respektivaj mallongaj vokaloj, do entute 6 vokaloj. Tiel la araba alfabeto estas preskau plene fonetika.

6. La araba alfabeto faciligas belan kaligrafion.

7. La araba alfabeto do ebligas relativan shparon de papero kaj inko.

8. Ĉu vere gravas por komforta skribado: chu oni rulas la manon de dekstre (la araba) au maldekstre?

9. Krom la araba, multaj aliaj lingvoj uzadis au ankoraŭ uzas la saman araban alfabeton kiu estas 14-jc. aĝa, ekz-e la persa, la turka, la urdua, la afgana, la kurda, la azria, foje iam ankau la hispana kaj la ukrainia.

Son-valoroj estas preksaŭ identaj en tiuj lingvoj. Pro malsamaj sonoj en diversaj lingvoj tamen kompreneble estas esceptoj. Tie, kelkfoje la ne-araba lingvo donas malsaman sonon al la sama araba litero (ekz-e la araba konsonanto "و" por la Esperanto "ŭ" [angla "w"] donas la sonon de "v" en la persa), au tiam oni iomete modifas la formon de iu litero por doni al ghi la alian apartan sonon de la alia lingvo. Nur malta araba lingvo uzas la romanan alfabeton.

10. Cetere, mencienda estas, ke en usona libro pri Turkujo, (kiu en la komenco de 20-a jc. shanghisian alfabeton de la araba en la romanan), oni donas ekzemplon pri "dusenceco" de la araba alfabeto en la turka vorto كل, kaj komentas, ke tiu vorto skribita en araba alfabeto signifas ambau blindulo kaj rozo. Oni tamen ignoras, ke blindulo estas كَل "gil" (kun suba 'kasra' la mollonga vokalo de "i", kaj rozo estas كَل "gul" kun (supra 'damma' la mallonga volako de "u"). En tiaj tre raraj kazoj, oni uzas la respektivajn mallongajn vokalojn por eviti dusencecon, ankau aprte en literaruraj tekstoj.

Tamen en la ordinara skriba kutime oni ne bezonas uzi tiujn vokalojn ĉar oni legas vorton (bildon) laŭ la sono (kaj signifo), kiuj estas jam konataj kutime ekde frua lernado.

Husejn

Ekzemploj:

Not vocalized	Vocalized	Sound	Roman Script	Meaning	Origin
أسود	أسود				
اسود	أسود				أسود usood usood lions Arabic
جمال					جمال jimaal jimaal camels Arabic
جمال					جمال jamaal jamaal beauty Arabic
لندن					لندن Landan Landan London English
بكو					بكو bokoo Beaucoup French
شفايسنك					شفايسنك shvaisung Schweisung welding German

A- Not vocalized text (غير محرّك)

من بعض صفات الصالحين

B- Vocalized literary text (محرّك)

الَّذِينَ يُنْفِقُونَ فِي السَّرَّاءِ وَالضَّرَّاءِ وَالْكَاطِمِينَ الْغَيْظَ بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَنِ الرَّحِيمِ  
وَالْعَافِينَ عَنِ النَّاسِ وَاللَّهُ يُحِبُّ الْمُحْسِنِينَ.

\* Resumo de prelego kun lumbildoj en Londona-Esperanto-klubo

Novaĵletero: oktobro 2011

Pri la Movado "OKUPU"

Ian Fantom

<ian@fantom.org.uk>

Date: 2011/11/1

- \* La movado 'Okupu' temas pri korporacia potenco
- \* Oka kaŝa policano trovita en britaj protestogrupoj
- \* Eksterordinaraj rimedoj por gajni kredindecon fare de kaŝaj agentoj
- \* Enfiltrado kaj disrompado en membraj asocioj
- \* Kiel trakti kun perfido, malkredo kaj percepta malakordo
- \* Kie estas la Internacia Krim-Kortumo?

Ŝajnas, ke jam ekis la revolucio. La Okupo-manifestacioj (<http://www.occupytogether.org/>) okazis en pli ol 95 urboj trans 82 landoj ([http://en.wikipedia.org/wiki/%22Occupy%22\\_protests](http://en.wikipedia.org/wiki/%22Occupy%22_protests)), sed ne plu temas nur pri 'la ekonomio, stultulo' (por uzi faman citaĵon de Bill Clinton), sed pri la korporacia ŝtato. La ekonomian krizon kaŭzis grandaj financaj institucioj kiuj havis pli da potenco ol havas elektitaj registaroj. Estis la ekonomio kiu aktivigis la homojn, sed aperas nun pli granda bildo.

Mussolini parolis pri "La Korporacia Ŝtato de Faŝismo". Ĝuste tio nun evoluas. Estis kaŝa Faŝismo, kun demokratia surfactavolo, sed ekde la ŝanĝiĝo de la jarcento homoj en Usono kaj Britio – 'Oceanio', kiel nomis ĝin George Orwell en '1984' – daŭre plisenpacienciĝis pro manko de voĉo en grandaj decidoj de la ŝtato. En Britio ni havis nenian voĉon en la invado de Irako en 2003, malgraŭ la du milionoj da homoj surstrate; la parlamento voĉdonis surbaze de mensogo. En 2001 la parlamento havis entute nenian voĉon, ĉar decidoj pri ekmilitado povis en tiu stadio esti prenitaj nur de la ĉefministro kune kun la monarĥo. Do kiu vere faris tiujn decidojn? Estas kreskanta sento tra la okcidenta mondo, ke tiajn decidojn prenas ne la elektitaj politikistoj, sed gigantaj financaj institucioj kiuj fine profitos el tiuj militoj.

Do kion oni atendus de korporacia socio? Ni eble ne atendus la saman brutalecon kiun oni havus en malkaŝe tiraneca reĝimo, kaj mi ja estas dankema al miaj kontraŭuloj, ke ili ne eltiris miajn fingrongojn, sed principe ni atendus ion similan. Korporacia socio ne subtenas demokratiajn valorojn, eĉ se ĝi tion



ŝajnigas. Iu ajn ĝena grupo estos enfiltrita de la korporacia ŝtato, por neŭtraligi ĝiajn agadojn, aŭ almenaŭ por teni ilin ene de iuj limoj. Kaj ĝuste tio evidentiĝis dum la pasinta jaro. La 20an de oktobro la vespera novaĵanaliza programo de BBC, Newsnight, elsendis pluan malkaŝon pri kaŝa policano kiu enfiltris civitanan grupon cele al ĝia subfosado.

La programero de Newsnight temis pri biciklista manifestacio de aŭgusto 1996 en centra Londono, en kiu grupeto apartiĝis kaj iris al la ĉefoficejo de la londona subtera fervojo, London Underground, por malvolvi banderolon. La incidento kondukis al falsa aresto de unu protestanto, kaj falsa atesto en kortumo fare de la kaŝa policano, kiu havis gvidan rolon en la afero. La policano estis Jim Boyling, konata en 'Reclaim the Steets' kiel Jim Sutton. La Metropola Polico estis publikigonta raporton de interna enketo la postan tagon, sed lastmomente tiu raporto estis prokrastita

(<http://www.guardian.co.uk/uk/2011/oct/20/undercover-police-inquiry-delayed>)

Evidentiĝis, ke la alternativa novaĵfonto Indymedia unue konsciiĝis pri la afero de kaŝaj policanoj en protestomovadoj (<http://sheffield.indymedia.co.uk/2011/01/472314.html>), kaj transdonis la informojn al The Guardian kaj la Newsnight-teamo de BBC. Denove, la tagordon liveras la alternativaj amaskomunikiloj kaj ne la pagitaj priesploraj ĵurnalistoj (<http://www.indymedia.org.uk/en/2011/01/472102.html>). Ĉar tiu ne estas nurbrita afero – iuj el tiuj britaj policanoj subfosis ankaŭ aliajn grupojn eksterlande – Indymedia nun petas al homoj traduki tekston pri tio en diversajn lingvojn (<http://www.indymedia.org.uk/en/2011/01/472162.html>).

Mi jam raportis pri Mark Kennedy, kiu rolis kiel Mark (Flash) Stone en mediprotekta grupo, kaj kies agoj preskaŭ rezultis al la enkarcerigo de almenaŭ dudek senkulpaj kampanjantoj (<http://www.guardian.co.uk/uk/2011/jan/09/undercover-office-green-activists>), kaj pri Lynn Watson (vera nomo nekonata), la policano vestita kiel klaŭno en Rebel Clown Army [Ribela Klaŭn-Armeo], eta grupo kiu protestis kontraŭ la irakan militon (<http://www.guardian.co.uk/uk/2011/jan/25/police-spy-lynn-watson-clown>). Aliaj kaŝaj policanoj malmaskitaj estis Bob Lambert, pozante kiel Bob Robinson (<http://www.guardian.co.uk/uk/2011/oct/23/police-spy-tricked-lover-activist>), Mark (Marco) Jacobs, kies vera nomo estas nekonata (<http://www.guardian.co.uk/uk/2011/jan/19/undercover-police-officer-mark-jacobs>), Peter Black (<http://www.guardian.co.uk/uk/2011/oct/26/police-spy-urges-public-inquiry>) kaj Simon Wellings (<http://www.bbc.co.uk/news/uk-12867187>).

Grupoj infektitaj estis diversaj protestogrupoj, kiel anarkiistaj, bestorajtaj, kontraŭfaŝismaj, kontraŭtutmondiĝaj, kontraŭrasismaj, medioprotektaj kaj politike maldekstraj. Tiuj grupoj inkluzivis: 2008 Camp For Climate Action [Tendumejo por Klimata Agado], manifestacio de 2008 kontraŭ la planita militserva akademio ĉe St Athan, Aldermaston Women's Peace Camp [Virina Pactendumejo ĉe Aldermaston], Animal Liberation Front [Besta Liberigofronto], anti-EDL [kontraŭ English Defence League], Cardiff Anarchist Network (CAN) [Anarkiista Reto de Cardiff], Cardiff Radical Socialist Forum [Radikala Socialista Forumo de Cardiff], Climate Camp [Klimata Tendumejo], The Common Place (Anarkiista centro en Leeds), Dissent! (la reto [mobilising] protestantojn por la pintokonferenco G8 ĉe Gleneagles), Globalise Resistance [Tutmondigu Resiston], London Greenpeace, No Border campaigns [kampanjojn kontraŭ landlimaj kontroloj], Rebel Clown Army [Ribela Klaŭna Armeo], Reclaim the Streets [Reposedu la Stratojn], Rising Tide Network [Reto Leviĝanta Tajdo], kaj la rekta-agada reto Trident

Ploughshares.

La ekstremoj ĝis kiuj povis iri iuj el tiuj kaŝaj policianoj por gajni kredindecon en la grupoj kiujn ili enfiltris estas eksterordinaraj. Kennedy provokis kolegajn policianojn lin disbati ĉe iu Klimata Tendumejo. Jim Boyling mensogis sub ĵuro en krima proceso por protekti sian identecon. Bob Lambert aperis en kortumo sub fikcia nomo. Pluraj el ili havis seksajn rilatojn kun iuj el siaj viktimoj, kelkfoje longdaŭrajn rilatojn. Jim Boyling eĉ edzinigis unu el siaj viktimoj kaj havis du infanojn kun ŝi, kiuj nun aĝas 5 kaj 7 (<http://www.thisislondon.co.uk/standard/article-23915950-officer-in-second-undercover-case-wed-activist-he-was-sent-to-spy-on.do>). Kiel oni klarigu tiun aferon al la infanoj, eĉ kiam ili estos pli aĝaj, kaj kiel ili sentos kiam ili konstatos la manieron per kiu ili envenis la mondon? Ĉu la ŝtato havas jurajn respondecojn por ilia financa subteno kaj kompenso pro eventuala psikologia traŭmo?

Se do ĉio tia okazas ĉe la polico en grupoj kiuj partoprenas en surstrata aktivismo, kio okazas rilate al la sekurecservoj en aliaj grupoj kiujn la korporacia ŝtato malaprobas? Mi jam pritraktis raportojn de eksaj oficistoj de MI5 pri grandskala enfiltrado en politikaj partioj, eĉ "etaj organizaĵoj kiuj prezentas nenian minacon al nacia sekureco". La celo estus ŝanĝi tiujn grupojn al regata opozicio, aŭ malmunti ilin, aŭ almenaŭ igi ilin senefikaj. Ŝajnas ke la Komunista Partio de Granda Britio kaj la Socialista Laborista Partio ambaŭ havis ĉirkaŭ mil membrojn en la tempo kiam falis la berlina muro, kaj ĉiuj havis laŭ mia kompreno dudek ĝis kvardek agentojn, kies tasko estis kaŭzi kverelojn kaj malmunti la organizaĵojn. Kiom vaste tio okazas, kaj ĝis kiuj limoj ili iros por 'gajni la kredindecon de la komitato', por uzi vortojn el retletero al mi de la Direktoro de Evoluigo de Esperanto-Asocio de Britio mallonge post kiam li eliris la postenon, konfesante, ke nur tion li faris dum la du jaroj en kiuj li estis pagata por evoluigi la asocion?

La reago de la plimulto de la homoj al io tia estas ŝajnigi, ke ĝi ne okazas, kaj provi silentigi aliajn kiam ili priparolas ĝin. Ili diros al vi, ke vi malinstigas al homoj aliĝi. Mi havas malan vidpunkton. Mi ĝojas vidi, ke la Anarkiista Reto de Cardiff elmetis deklaron pri tio (<http://www.permanentrevolution.net/entry/3251>). Ili skribis: "Sed li [Marco Jacobs] ankaŭ intence kaj sisteme celis damaĝi la movadon, kaj ni opinias, ke estas grave, ke scio pri tio kion li faris, kaj kiel li faris, estu komunigita kaj diskutita laŭeble plej vaste". Ili skribis ankaŭ, ke multaj membroj skuiĝis pro kolero, indigniĝo kaj sinkulpigo. "Marco laboregis por dissemi malfidon, malŝaton kaj suspekton inter ni, kaj estis la fakto, ke ni permesis al li ke li tion faru, kiu estis nia plej granda eraro", ili skribis.

Tamen post la tuto de ĉi tio, ŝajnas, ke neniu kapablas elbuŝigi la vortojn 'la brita sekreta polico', eĉ kvankam estas evidentege, ke ekzistas io tia. Tamen la polico nun havas problemon, ĉar se ili daŭre agos kiel brutaluloj de SS oni malkovros pluajn kazojn de tio. Estis en ilia intereso ke ili tenu siajn nazojn puraj ĝis la tuta afero preterpasos. Eble pro tio estis tiom malmulte da perforto en la manifestacioj 'Okupu' en Londono ĉi-monate. Ĝenerale inter multaj el la regulaj manifestaciantoj por diversaj aferoj en centra Londono estas la kredo, ke la polico regule uzas tiajn taktikojn. La forpasinta Brian Haw amare plendis pri tiaj aferoj (<http://brianhaw.tv/index.php/blog/319-blog-qmy-new-campaign-is-a-campaign-against-brian-haw-hawq>), kaj iama brita parlamentano George Galloway faris akuzojn pri agentoj provokaj dum iuj manifestacioj. Mi mem ne estus kredinta ke povus okazi tiaj aferoj ĝis mi ekpartoprenis en manifestacioj veromovadaj kaj kontraŭmilitaj antaŭ nur kelkaj jaroj, kiam mi ekvidis aferojn por mi

mem.

Necesas, ke pli da homoj elparolu. La plimulto de la homoj kiuj scias iujn aferojn ne faros, kaj tiuj kiuj faras estos kritikitaj pro iliaj 'metodoj'. Iuj homoj, kiel tiu en Sud-Jorkŝira Polico en la afero Tony Farrell, vidas sin kiel 'piedsoldatojn de la registaro' kaj do estas konscie komplikaj en la maskado. Aliaj, kiel multaj kiujn mi konas, tutsimple estas en stato de sintrompo, aŭ suferas de Percepta Malakordo aŭ Duobla Pensado. Eĉ tiuj kiuj konstatas kio okazas restas silentaj. Tamen kelkaj, kiaj Tony Farrell, havas la kuraĝon elparoli.

Dum miaj esploroj pri la Esperanto-asocio en 2005 mi kun ĝojo estus ie trovinta raporton pri subfosado en iu alia membra asocio kiu estas transprenata de interna kliko, tiel kie mi mem povu vidi kiel tio funkcias, por ke mi havu bazon por komparado. Certe iu, ie, estus faranta iajn esplorojn pri la propra asocio. Ĉu neniu en la Laborpartio kompilis membrostatistikojn kaj ligis ilin kun tio kion registris la protokoloj kaj la kontoj? Mi trovis nenion. Se iu ajn scias pri ia laboro tia, mi ŝategus ricevi informojn pri tio. Ni bezonas informojn por konstrui pli grandan bildon pri la situacio, kiu nun aspektas ege malbonaŭgura.

Mi povas diri, ke finfine ni havas reagon de la Esperanto-asocio pri mia financa grafikaĵo, kiun mi fine sukcesis publikigi en EAB Update ([http://esperanto-gb.org/eab/eab\\_update/gxisdate53.pdf](http://esperanto-gb.org/eab/eab_update/gxisdate53.pdf) pp12-13). En la sekva numero, la kasisto akceptis, ke miaj ciferoj estas ĝustaj. Tiu numero de la gazeto jam aperis en la Interreto, por ke ni ĉiuj povu vidi ĝin ([http://esperanto-gb.org/eab/eab\\_update/gxisdate54.pdf](http://esperanto-gb.org/eab/eab_update/gxisdate54.pdf) p19). Tio signifas, ke ŝi nun devus klarigi, kial ŝi diris al la Estraro, ke la kapitalo estis formanĝata kiam ĝi estis kreskanta. Anstataŭ fari tion, ŝi demonstris kiel ŝi ankaŭ donis la saman impreson al la membroj, produktante rivalan grafikaĵon kiu montras malkreskantan kapitalon. Ŝi povas esti certa, ke malmultaj membroj legos la tekston, ĉar ili havas tiom da fido en la kasisto, ke ili rifuzus kredi, ke tia kontraŭdiro eblus, prefere ol rigardi la pruaĵon, kaj pro tio ili ne rimarkus, ke tio estas la prognozo por novembro 1994! Kial prezenti prognozajn ciferojn kiam oni havas la verajn ciferojn, krom se la intenco estas trompi? La alia grafikaĵo donas impreson de ĉiujaraj perdoj, kiu evidente ne povas esti la situacio se la kapitalo fakte estis kreskanta.

Tamen membroj ne elparolos, sed anstataŭe kritikos min pro tio kie mi faras. En la sama numero (paĝo 17) antaŭa ĝenerala sekretario esprimas, ke li ne povas vidi la celon publikigi mian artikolon, eĉ kvankam li diras, ke mi havas argumenton. Li skribis ankaŭ, ke mia grafikaĵo levas la demandon, kial ili vendis la butikon en Londono. Bone, sed tiu estis lia demando, ne mia. Mi estus povinta esti prezentinta argumenton, sed mi ne faris. Tiu letero efektive estis verkita antaŭ ol aperis mia artikolo, kvankam ĝi estis prezentita kiel reago al ĝi. Kritiko al la Prezidanto, kun kiu mi plenkore konsentas, estis eltranĉita de la redaktoro, kiu ankaŭ malakceptis mian respondon, dirante, ke la afero de la kapitalo estas 'non-issue' [ne-afero].

Dua letero en la sama numero, de iama Prezidanto, kritikis min pro pli-malpli ĉio sub la suno, inkluzive de mia laboro por la veromovado 9-11, sed ĝi evitas la aferon kiun mi levis en mia artikolo (pp 17-18).

Estis nenio provoka pri mia artikolo, kaj neniel ĝi kritikis la komitaton, ĉar tio estis eksplicita kondiĉo trudita de la redaktoro. La problemo kiel vekis la homojn en membra asocio estas etskala ekzemplo de vekado de la homamasoj en la kazo de kaŝa tiraneco. La solvo kiun mi vidas estas duopa: (1) traktu kun la eta minoritato kiu pretas trakti kun vi, kaj (2) prenu la aferon ekster la cerbolavitan komunumon. Tiam aferoj povas ekokazi. La deklaro de la Anarkiista Reto de Cardiff eble helpas kuraĝigi aliajn elparoli. Mi trovis ankaŭ artikolon de komediulo Mark Thomas, kiu devis veni al akcepto de la fakto, ke estis trovite, ke intima amiko kaj fidata kunlaboranto spionadis pri lia aktiveco (<http://www.guardian.co.uk/world/2007/dec/04/bae.armstrade>). Tiu evidentiĝis esti industria spionado, kio rekondukas nin al la ideo, ke la tuto estas diversaj aspektoj de la korporacia ŝtato. Se tio kaŭzas tiom da angoro, imagi kiel estas se estas kvin, dek aŭ dudek el ili, kiujn vi konis dum sama nombro da jaroj. Mi trovis interesan videon titolitan 'Psychologists help 9/11 truth deniers' [Psikologoj helpas al neantoj de vero pri 9-11] (<http://www.911truth.no/2011/09/>), kiu priskribas kiel homoj reagis kiam iliaj fundamentaj kredoj trafas defion. Tiu ja valoras spektadon fare de iu ajn kiu komprenas la anglan. Ĝi validas ne nur rilate al 9-11, sed al iu ajn situacio en kiu homoj eble reagis dirante "Mi rifuzas kredi ...", prefere ol rigardi la pruvojn.

Mi ricevis unu-du mesaĝojn de Esperantistoj kiuj diras, ke ili interesiĝis aŭdi pri la enfiltrado de la biciklista grupo aŭ la mediprotekta grupo, sed ke mi restu silenta pri la Esperanto-afero. Finfine ili konstato, ke per la sama logiko iuj en la biciklista grupo, la mediprotekta grupo, la veromovado 9-11, kaj multaj aliaj grupoj eble interesiĝos pri la Esperanta afero pro la sama kialo. La komuna afero por ĉiuj tiuj grupoj, eĉ se ili laboras por diversaj celoj kaj eble ne konsentas unu kun alia, estas la defendo de la demokratio. Por ke nedemokratiaj metodoj estu prilimitaj, necesas ke homoj elparolu publike. Ne necesas povi pruvi kiu enfiltris organizaĵon kaj kun kiu celo; necesas demonstri nur konduton. Mia krimo estis produkti solidajn faktojn, kun nenio akuzoj aŭ interpreto. Estis tiam por aliaj interpreti tiujn faktojn, kaj ni ĵus vidis ekzemplojn de tio en la gazeto. Aliflanke, membroj devintus esti pli konsciaj pri nedemokratiaj metodoj uzataj de homoj influhavaj. Tiu esence estis la argumento de antaŭa kontisto por la Eŭropa Komisiono Martha Andreasson, kiu nun estas EU-parlamentano por mia regiono. La kontoj ne estis kontrolitaj, kaj tio en si mem devus esti bona kaŭzo forigi de ofico reprezentantojn de la popoloj kiuj estras en tio. Kaŝado devus en si mem esti sufiĉas kaŭzo forigi de ofico reprezentantojn de la homoj, ĉu en registara nivelo, ĉu en eta membra asocio.

Mia ideo antaŭenigi la Esperantan aferon proksimume samrapide kiel la ĝenerala veromovado ŝajnas esti sukcesa. Mi raportis en mia plej lasta novaĵletero pri raporto en Guardian pri 9-11-konferenco en Usono. Post tio ni vidis blogon de Daily Telegraph, kutime unu el la naciaj gazetoj plej subtenaj al la landa elito, kun titolo 'The 9/11 conspiracy theories aren't as irrational as you might think ' [La konspirteorioj de 9-11 ne estas tiom neraciaj kiom vi eble pensus] (<http://blogs.telegraph.co.uk/news/timstanley/100104249/the-911-conspiracy-theories-arent-as-irrational-as-you-might-think/>). La cetero de la artikolo estis kritikema pri la veromovado, sed almenaŭ ĉi tie ni havas kontraŭvolan akcepton, ke ni efektive eble havas argumenton. Ili venu plu! Instigu al ili daŭre kritikaĉi nin, kondiĉe, ke estas kontraŭvola konfeso ke eble ni pravus!

Estas ankaŭ grandaj demandoj kiuj leviĝas en la tradiciaj amaskomunikiloj. La murdo de Muammar

Gadafi eble estis neregebla venĝomortigo fare de soldatoj surloke, aŭ eble tio estis lasita okazi fare de tiuj pli altaj en la rangoj. Gadafi estus konstatinta, ke ili ne povus sendi lin al la Internacia Krim-Kortumo por proceso pro la kulpoimplica pruvaĵo kiun li povus provizi kontraŭ iujn el la NATO-registaroj. Lian murdon fakte provis grupo en la 1990aj jaroj fare de grupo nun konata kiel Alkaido, pripagita de MI6, sed oni fuŝis ĝin. Tiu estis la afero kiu fine decidigis David Shayler decidi forlasi MI5 kaj malmaski aferojn.

Rilate al la Eŭro-krizo, ĉu la tuto ne estis neevitebla ekde la komenco? Mi restis kvieta kiam oni estis enkondukanta la Eŭron, ĉar mi supozis min sensciulo pri ekonomiaj aferoj, kiam la spertuloj diradis al ni, ke la afero estos en ordo. Ĉu vere ni devas kredi, ke neniu en la altaj tavoloj de EU konstatis la fuŝon en la argumento? Multaj en la financaj merkatoj sub ili estus sintrompantaj prefere ol akcepti la evidenton. Do ĉu tiu estis projekto destinita al fiakso? Ĉu la celo estis devigi al EU-landoj fariĝi ia Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo simila al Unuiĝintaj Ŝtatoj de Norda Ameriko? Bone se ili deziras formi tian union, sed nur se tia decido estas prenita demokratie. Kio do okazus se ni en Britio havos referendumon pri forlaso de EU? Estas vere tute simple. Se la voĉdono estos 'kontraŭ' ni restas ene, kaj se ĝi estos 'por' ni havos pluan referendumon. Sed se ni vere eltiriĝus, kio estus la sekvoj? Ĉu ne estas tempo, ke iu produktus decan analizon? Ĉu tiuj kiuj deziras, ke la potenco revenu al Westminster sintrompas? Kiu nun havas la potencon, kaj kiu havus ĝin se ni eltiriĝus? Sonas al mi kiel la gigantaj financaj korporacioj en ambaŭ okazoj. Estas nur demando, kiuj el la financaj korporacioj.

Do kien ni iru de ĉi tie? Mi opinias, ke ni estas sur la ĝusta vojo. Necesas konservi konscion pri la pli granda bildo rilate al korporacia regado en nia socio, la maniero per kiu ni estas manipulataj de kaŝa propagando, financa traktado, timigado, kaj enfiltrado eĉ en etaj membroasocioj kiuj prezentas nenian minacon al nacia sekureco. Estos pliaj malkaŝoj. Kaj ja, dum mi finpretigas tiun ĉi novaĵleteron mi aŭdas pri stranga afero en kiu la superbazaro Tesco laŭdire dungas policianojn, kaj blorgejo pri tio estas starigita por tion diskuti (<http://tescops.wordpress.com>).

Kiam la movado Okupu komencos aperigi afiŝojn rilate al 9-11-vero, tiam la tuta demando, kiu regas nian socion, atingos klimakson.

Sed la danĝero estas, kiel ĉiam, ke estos ia falsflaga evento, kiu povus konformigi ĉiujn, ke ili subtenu la venontan militon, kaj persvadante la populacion, ke ili ja vere amas Grandan Fraton. Ĉe la oktobra kunveno de la grupo Keep Talking en Londono ni havis gastparolanton el Oslo, Torstein Viddal, kiu estas la kerna veromovada esploristo pri la norvegaj atakoj de julio 22. Li loĝas nur du minutojn for de la loko en Oslo kie eksplodis la bombo, kaj malgraŭ konstruaĵo inter li kaj la eskplodo, lia fenestro estis blovita malferma. La ekprenis sian fotilon kaj hastis eksteren. Ĉe la kunveno de Keep Talking, li montris mallongan videon de la maniero en kiu funkcias la Internacia Krim-Kortumo, kaj sugestis ke ni voku por priesploro fare de la Internacia Krim-Kortumo cele al procesado pro militkrimoj. Tio pripensindas. Lian tekston oni povas legi en la retejo de la norvega veromovado 9-11 (<http://www.911truth.no/2011/10/911-77-227-and-the-icc/>).

Ankaŭ pripensindas la afero de korporacia registaro, kaj kiel kunigi ĉiujn tiujn aferojn en la nuna ribelo, kaj kiel trakti kun la venonta terorisma evento, kiu ja povus esti celita por dereligi la ribelon kaj doni

pretekston eniri kun klabetoj, tazeroj, militbotoj, kaj pli malbone. Daŭrigu la pensadon. Kaj daŭrigu la paroladon.

Salutas Ian  
ian@fantom.org.uk

Berkshire 9/11 Truth  
<http://www.berkshire911truth.org.uk> (retestro: David Bowman)  
<http://berkshire911truth.blogspot.com/> (novaĵleteroj: Ian Fantom)

La germanaj esploristoj pri la albana lingvo

Verkite de Xhelal Zeneĵli

La historio kaj la lingvo de albanoj, unu "nekonata tero" por la Okcidenta Eŭropo dum la Renesanco, fariĝis relative malfrue objekton de viva interesiĝado kaj scienca esplorado poste.

Tio komenciĝis per la studoj de filozofo kaj lingvisto germana Gotfried Leibnitz (1646-1716) kaj la sveda historiisto Hans Erich Tunmann, (1746-1778); profesoro en la universitato de Halle de Germanio.

Tunmann en sia verko "Esploraĵoj pri la historio de la popoloj de la Orienta Eŭropo" (1774) klopodas ekspliki la originon de albanoj kaj ties lingvon. Laŭ li, bazite sur la antikvaj greko-latinaj-bizantinaj dokumentoj, la mezepokaj albanoj estas la posteuloj aŭtoktonaj de iliroj.

Kiam la bibliotekisto de la Reĝa Biblioteko de Berlino, fondita de Akademio de Sciencoj de Prusio petis de Leibnitz sin prononci pri la deveno de la albana lingvo, Leibnitz sin egaĝis serioze pri la temo. Rezulte, laŭ tri liaj leteroj konataj nun kiel "albanaj leteroj" senditaj al la bibliotekisto, Leibnitz konsideras la albanan "lingvo de la antikvaj iliroj". Li diras ke disponis pri libro kaj vortaro de la albana lingvo kiuj estis fakte "La Kristana Doktrino" (1618) de Pjeter Budi (albano, 1566-1622) kaj "La Vortaro Latina-albana" ("Dictionarium latino-epiroticum") (1635) de Frang Bardhi (albano, 1606-1643).

La granda filozofo uzadis la unua la metodojn de tiel nomata Kompara Lingvistiko.

La koncepto de la lingvofamilio indoeŭropa en ĝia embria formo lanĉiĝis unuafoje de William Jones ĉirkaŭ 80 jarojn post la leteroj de Leibnitz. Alia lingvisto germana Franz Bopp, (1791-1867) estis la unua kiu argumentigis ke la albana membras al la indoeŭropa lingvofamilio, dum la filozofo kaj historiisto el 18a jc. Johann Gotfried Herder en sia verko "Ideoj pri la historio de la homaro", (1784-1791), parolas ankaŭ pri albanoj. "Ili estas tute ne fremdaj, sed antikva popolo de la eŭropa familio"

Laŭ Herder a) albanoj havas praan historian kaj b) albanoj devenas de iliroj.

En la jaro 1850 August Schleier pruvigis la indoeŭropan karakteron de la albana..

La albanologo Josef Ritter Xylander, (1794-1854) aŭtoras por la verko "La lingvo de albanoj" (Die Sprache der Albanesen oder Schkipëtaren, 1835). Tiutempe estis aperinta ankaŭ la ideo kiu neadis la aŭtoktonecon de albanoj, sekve ankaŭ ties iliran devenon., far la bizancaj aŭtoroj kiel Halkokondil kaj ekleziaj historiistoj Le-Quien kaj Asseman, kiuj konsideris albanojn alvenintojn dum la Mezepoko, la unua de Alba de Italio kaj la dua de Albania de Kaukazio.

La ĝenerala franca konsulo ĉe la paŝaolando de Janina, François Charles Henry Louis Pouqueville, (1770-1838), kuracisto, naturalisto, diplomato kaj historiisto, studis deapude la agadon de Ali Paŝao (albano) kaj kolektis multajn informojn pri albanoj. Liaj libroj tiuteme estas "Vojaĝo tra Grekio" (6 volumoj, Parizo, 1820), "Historio de renaskiĝo de Grekio". Li ege admiras grekojn kaj iel denigras albanojn.

La angla reprezentanto en Janina estis William Martin Leak (1777-1860). Leak aŭtoras por la libro "Vojaĝo tra Norda Grekio" (Travels in Northern Greece, London, 1835).

Per ĉi tiuj verkoj la scienca eŭropa mondo akiris riĉan informacion pri Albanio kaj sin instigis por pluesplori tiun landon kaj ties historion.

Tra Albanio vojaĝis ankaŭ la romantika angla poeto George G. Byron, (1788-1824) kaj lia amiko John Hobhaus (1786-1869), samkiel la franca sciulo Ami Bue (1794-1881) kaj arkeologo Leon Heuzey.

En la dua kanzono de sia poemo "La elmigroj de Child Harold" (1812-1818) Byron aprecas la bravajn tradiciojn, kuraĝon, noblecon kaj bongastamon de albanoj.

Pri la problemo de la deveno de albanoj sin prononcis nur la reprezentantoj fremdaj en Janina. Pouqueville akceptas la fantastikan vidpunkton de la ekleziaj historiistoj dum Leak la kontraŭon.

Ekde la jaroj 40 de XIX jc ankaŭ Aŭstrio malfermis sian konsulejon en Janina.

En Frankfurt-sur-Mein, aperis (1935) la libro de la Bavaria lingvisto Xylander, kiu bazite sur 35 00 vortoj de la albana kontraŭis la tataran kaj kaŭkazian devenon de la albana, sin esprimante ke ĝi estas ja devene de la ilira kaj albanoj posteuloj de iliroj.

La germana albanologo Johan Georg von Hann (1811-1869) dum sia vojaĝo tra Albanio kaj Grekio, konatiĝis kun albanoj kaj arbeŝoj (albanoj elmigrintaj en Grekion aŭ Italion). Kiel konsulo de Aŭstrio en Janina en la jaro 1847 li havis eblecon sin dediĉi al la studado de la albana kaj albanoj. Li verkis "Albanaj studoj" (Albanesische Studien, Jena, 1954). Pli poste li publikigis "Vojaĝo tra la regionoj de Drin kaj Vardar" (riveroj en Albanio kaj Makedonio), (1867-1869).

Hann skribas: "Ĉar albanoj ne estas slavoj kaj sin tute ne ligas kun kelkiu alia popolo konata, ĉar laŭ la fontoj disponeblaj ni ne konas ian enmigradon alian krom tiu slava, tiom granda por ke ĝi kreu grandan popolon, oni devas agnoski ke la hodiaŭaj albanoj estas praaĵ loĝantoj antaŭslavaj de ĉi tiu lando"

En la jaro 1868 Hann publikigas en Vieno sian verkon "Vojaĝo de Belgrado ĝis Selaniko", kie li reformuligas sian vidpunkton pri la aŭtoktoneco de albanoj: "Ni povas akcepti sendiskuteble ke la hodiaŭaj albanoj estas posteuloj de la pratempaj iliroj kaj epiranoj" (citita verko, p. 228).

En la libro li priskribas la loĝatajn regionojn de albanoj en Kosovo, Makedonio kaj Serbio, agnoskas la dardanan devenon de albanoj en tiuj regionoj. Tuj reagis negative en la jaro 1855 Nikokles de la universitato de Heidelberg, kiu daŭre defendis sian tezon pri la deveno de albanoj el Kaukazio.

La tezo de Nikokles ricevis scienca respondon en la jaro 1857 de la germana historiisto J. Ph. Fallmerayer, kiu montris ĝian antiscienca karakteron. En sia verko en tri partoj "La albana elemento en Grekio, 1857", li priskribas la situacion pri la studoj ĉirkaŭ la deveno de albanoj, evidentante la dominantecon de la tezo pri ilia aŭtoktoneco rilate la aloktonecon. Falmeraier malkovras la altan vitecon de la albana popolo, ĝian eksterordinaran rezistadon al la kultura kaj etna asimilado, konsiderante albanojn vivan ekzemplon de militema popolo survivinta eĉ spite de plej sovaĝaj stormoj de la historio.

Dum la jaroj 40 de XIX jc la albanan studis ankaŭ Franz Bopp (1791-1867), profesoro en la universitato de Berlino kaj August Schleier (1821-1868). En la jaro 1843 F. Bopp esploris la numeralojn kaj la pronomojn de la albana kaj deduktis el tio pri la indoeŭropa karaktero de ĝi, konfirmante la rezultaton de Xylander.

En la jaro 1850 August Schleier, konata kiel la fondinto de la geneologia arbo en la kompara indoeŭropa lingvistiko kaj rekonstruinto de la lingvo protoindoeŭropa estis pruvinta la indoeŭropan karakteron de la albana lokinte ĝin apud la greka.

Sed en la jaro 1855 Bopp faligis la vidpunkton de Scheier pri la intima ligo de la albana al la greka.

Je la mezo de XIX jc Teodor Memesen verkis sian libron "Dialektoj de la Suda Italio" per kiu konkludis ke la mesapa ege ligiĝas al la ilira kaj la albana. En la libro "Historio de Romo", li konsideras la pratempajn epiranojn gvidataj de Pirro kiel "albanoj de pratempo".

la kulmino estis la apero de la etimologia vortaro de la albana far Gustav Meier (1850-1900) en la jaro 1891. Li malfermis la vojon al la historia fonetiko de la albana, en kies kampon kontribuis poste ankaŭ dano Holger Pedersen (1867-1953; aŭstro Norbert Jokl (1877-1942); Eqrem Çabej (albano, 1908-1980) kaj hodiaŭaj esploristoj Erik Hempi, Martin Huldi, ka.

En la jaro 1877 en Germanio aperas la unua antropologia studo pri albanoj de Rudolf Virchow, (1821-1902) konata ankaŭ kiel fondinto de la ĉela patologio. Li publikigis en Berlino la laboraĵon "Pri la kraniologio de iliroj".

La kraniojn de albanoj studitaj de li, Virhov konsideras iliraj.

Je la fino de XIX Helbig malkovris ke la homnomoj renkontitaj sur la mesapaj surskriboj en multaj kazoj estas preskaŭ tutsamaj al la iliraj antroponimoj de la orienta marbordo de Adriatiko.

Mesapoj estis neitalika gento kiuj estis elmigrintaj en la sudan Italion de Epiro kaj Ilirio. Ili estis ja branĉeto de la ilira trunko. Por deĉifri la mesapajn surskribojn, la sciuloj decidis uzadi la albanan. La germano S. Buge en la jaroj 90 de XIX jc. publikigis la laboraĵon "La Mesapa kaj la Albana" kie laŭ la fonetika evoluo ankaŭ en la leksiko, inter la lingvo de mesapoj praaj kaj hodiaŭa albana dedektas vicon de koincidoj.



Komence de XX jc. sekvis la studoj de A. fon Blumental, dum en la jaroj 60 de XX jc la studoj de O. Hass..

Paul Krechmer en sia ĉefverko “Enkonduko en la historio de la greka lingvo” (1896), pritraktas la problemojn de la ilira en sia unueco kun la albana kaj la mesapa.

La germanaj sciencistoj similas al Prometeo kiu elitis la fajron de la vero el la mallumo, koncerne la albanajn studojn.

(Ĉi artikolo aperos sur la revuo “La Gazeto”)

## Beletraĵoj

Fragmento el la libro “Skanderbeg- hero de Albanujo”

Unua ĉapitro

La stato de Albanujo antaŭ la apero de Skanderbeg.

Por bone kompreni la historion de Skanderbeg necesas iri je kelke da jaroj malantaŭen kaj koni la staton de Albanujo antaŭ la apero de nia heroo, t. e. kiam la turkoj subpremadis unuafoje Albanujon.

Post kiam la turkoj konkeris Makedonion kaj venkis la serbojn en la batalo apud Marica en la jaro 1362, ili komencis eniri Albanujon. Regis tiam la nordan Albanujon Balsha (Balša) la 1-a, kiu, post la morto de la serba caro, Stefan Dušan, deklaris sin sendependa kaj liberigis la supran Albanujon ĝis la rivero Drin. Poste li larĝigis la limon en Montenegro kunhelpate de siaj filoj Strazimir, Georgo kaj Balsha. Tiel la tuta norda Albanujo estis liberigita el la serba jugo.



Por havi nenian ligan kun la serboj, Balsha la 1-a kaj liaj filoj, kiuj estis ortodoksaj, fariĝis katolikoj kaj ilin sekvis multaj iliaj subuloj. Georgo la 1-a Balsha, kun helpo de siaj fratoj kaj de kelkaj princoj albanaj, finis la laboron komencitan de la maljuna Balsha: li konkeris Kruja-n, Durrresi-n, Berati-n, Vlora-n, Kanina-n, Gjirokastra-n kaj Kosturi-n; li larĝigis oriente sian regnon ĝis Makedonio, atingis norde Dalmation, sude Tesalonikon kaj estis la unua kaj la lasta reĝo albana kiu havis regnon kun suprediritaj limoj. Li sukcesis revivigi la ilirian regnon. Li mortis en la jaro 1370.



Albanaj princlandoj



Gjirokastra

Post la morto de Georgo la 1-a Balsha, la situacio ŝanĝiĝis kaj la albanoj estis devigataj sin defendi de ĉiuj flankoj, kontraŭ la turkoj oriente, la serboj kaj bosnianoj norde, kontraŭ la Venecianoj okcidente, la frankoj-napolanoj sude.

En 1385, kiam regis la sultano Murado la 1-a, la turka armeo de 40 000 militistoj komandita de veziro Hajredin eniris tra Makedonio Albanujon, konkeris Kosturi-n kaj Berati-n. En la kampo de Savra, proksime de Elbasan, okazis granda batalo, en kiu Balsha la 2-a, frato de Georgo la Balsha, kaj filo de Balsha la 1-a estis venkitaj kaj mortigitaj. Post kiam foriris la veziro Hajredin Pasha (Paŝa), la princoj albanaj de Muzeqeja forpelis el Berati kaj Kosturi la turkajn garnizonojn de li lasitajn.

En 1389 Georgo la 2-a Balsha, Teodoro Muzaka, Georgo Kastrioti, la avo de Skanderbeg kaj kelkaj aliaj princoj albanaj kuniĝis kun la caro Lazaro de Serbujo, kiu organizis krucan militiron kontraŭ la sultano Murado la 1-a. La kruca armeo formata el serboj, bulgaroj, bosnianoj, albanoj, rumanoj, poloj kaj hungaroj renkontis la turkan armeon sur Kosovo polje (=Merla kampo).



En la milita konsiliĝo, prezidita de la caro Lazaro, Georgo Kastrioti estis proponinta ataki la turkojn nokte, sed lia propono ne estis akceptita de aliaj konsilianoj opiniantaj, ke la malamiko povus sin savi de plena malvenko kaj tra la mallumo forkuri. Tiam ili atakis tage kaj estis plene venkitaj de la turkoj. Inter la mortintoj troviĝis ankaŭ la sultano Murado la 1-a, mem princo Lazaro kaj Teodoro la 2-a Muzaka.



Sultano Murado I (1362-1389)




Reĝo Lazaro Hrebreljanoviĉ (1329-1389)

Tiam komenciĝis la senĉesaj militoj inter la albanoj kaj la turkoj. La sultano Bajazid Jilderim, venĝe, atakis Albanujon ĉiufanke kaj inter la jaroj 1394-1396 konkeris ĝin tute, de Gjirokastra (Ĝirokastra) ĝis Shkodra (Ŝkodra), de Kosturi ĝis Durrresi.



Sultano Bajazido II

Post la jaro 1402, kiam la sultano Bajazid estis venkita kaj kaptita de Timur-lenk, la albanoj ree ribeliĝis. Gjin (Ĝin) Zenevizi reprenis Gjirokastra-n; Andro Muzaka Devolli-n kaj Myzeqeja-n; Nikit Thopia Kruja-n; la Balshoj kaj aliaj princoj forpelis la turkojn el iliaj teritorioj.



Kruja hodiaŭ

Balsha la 3-a, la lasta de tiu dinastio eminenta, post kiam li venkis Evrenos Paŝao-n en 1410, malakordiĝis kun la respubliko Venecia, kiu deklaris al li militon. Li metis sin tiel inter du fajroj kaj, post kiam li estis perdinta preskaŭ tutan regnon sian, mortis en la jaro 1422. Venecio konkeris Durrresi-n, Leshi-n, Ulqini-n, Tivari-n, Drishti-n kaj Shkodra-n. La turkoj, sub la sultano Mehmet la 1-a, okupis en 1415 Kruja-n, Vlora-n en 1417 kaj Kanina-n en 1420, kiujn li perdis ree okaze de alia ribelo.

Post kiam mortis Balsha la 3-a, malproksima kuzo lia, princo Stefano Cernoviĉi, kiu heredis parton de liaj posedaĵoj, regis Montenegro-n sen Ulqin kaj Tivar, kaj elektis sidejon en Zhabjak, proksime al la rivero Maraĉa; alia kuzo, Paŭlo Stres Balsha heredis la regionon inter Kruja kaj Leshi. Tiel, unu jaron post kiam

suriris la tronon turkan sultano Murad la 2-a, estingiĝis la unua branĉo de la dinastio Balsha kune kun la regno, kiun ĝi sukcesis krei. Sed ĝia regno lasis impresojn, ne sole donante al Albanujo du grandajn liberigantojn kiel Balsha la 1-a kaj Georgo la 1-a, kiuj vekis en la koro de la nacio la sendependecan spiriton, la senton pri la forto de unueco kaj la sopiron al nacia libereco, sed ankaŭ tiu dinastio heredigis la Katolikan Eklezion, kiu kaŭzis la protektadon de la Papo kaj la kunhelpon de katolikaj fortoj de la Okcidento, en kiu metis sian esperon pli malfrue Skanderbeg komencante sian militan agadon mirindan.



Skanderbeg- portreto

Post la estingiĝo de la Balsha dinastio ŝajnis ke Albanujo estos definitive partigita inter Turkujo kaj Venecio. Tiam impreson pliiĝis la kontrakto farita inter tiuj ĉi potencoj en 1408, laŭ kiu Venecio prenis sur sin la devon pagi al Turkujo tributon pro la teritorioj albanaj, kiujn ĝi tenadis ĉe la marbordo. Al la albanoj, tiamaniere perfiditaj, restis sole akordiĝi kun Turkujo sub kondiĉoj kiom eble plej bonaj. Agnoskante la turkan suverenecon kaj pagante tributon, la albanoj estus povintaj ĝui pacon havante aŭtonomion. Estis konsilinde sekvi tion pro la tiama situacio, sed ilia karaktero fiera malpermesis al ili formeti armilojn, antaŭ ol ili estus militintaj sur honora kampo, ĝis kiam al ili estus rompita la glavo kaj elŝirita la batalforto.

La turka forto pliiĝis kaj ekatingis sian kulminon; la bizanca regno povis apenaŭ spiri; Serbujo estis lamigita; Bulgarujo estis subpremita; Makedonio kaj norda Grekujo sub turka jugo; sole la malgranda Albanujo, izolita, ne organizita, ekforirinta tiam el granda tumulto, preparis sin por forigi, paŝon post paŝo, la piedpremon de la teritorio al ĝi restinta. La turkoj, ĝis tiam aliloke okupitaj, ne havis tempon posedpreni definitive Albanujon, eble esperante, ke ili havas ĝin per la kontrakto subskribita kun Venecio. Sed inter la donaco per kontrakto kaj la konkero de la teritorio per milito estis profundegaĵo, por kies plenigo necesis pli ol sepdek jaroj kaj kiu neniam povis estis tute plenigita.

La ĝis ekstrema furioza milito inter Albanujo kaj Turkujo komenciĝis en la jaro 1421 kiam la sultano Murad la 2-a, 18 jara, sin zonis per osmana glavo; ĝi estis ne egala milito inter netimigebla Goliato, bone nutrita kaj armita, kaj Davido malgranda sen manĝaĵo kaj sen sufiĉaj armiloj. La senespera milito estus lasita de kiu ajn kiel perdita, sed ne de la albanoj. Kiam aliaj nacioj pli fortaj, pli grandaj, pli organizitaj

estis submetitaj de Turkujo kun malhoriga facileco, la albanoj militis senĉese de 1385 ĝis 1479, preskaŭ tutan unu jarcenton, defendis la patrujan sendependecon kaj la honoron de siaj armiloj kontraŭ la sultanoj plej maltime kaj kiujn estis havinta Turkujo, kun kuraĝo kaj persisto mirinda.

Kiam la Balsha dinastio estingiĝis, ceteraj princoj albanaj akiris potencon, inter kiuj Johano Kastrioti, princo de Kruja, Mat kaj Vumenishti, en norda Albanujo, kaj en la malsupra la princo Arianit Komneni Thopija Golemi, princo de Kanina, Himara, Çermenika (Ĉermenika) kaj Shpati.



Kanina kastelo

La familio Kastrioti devenis el la vilaĝo nomata Kastria, kuŝanta en la regiono de Mati, aŭ, laŭ aliaj historiistoj, apud Mazreku en la monta regiono proksime de la rivero Drin. Johano Kastrioti estis edziĝinta kun Voisava, la filino de la princo Pollogu el la regiono inter Gostivari kaj Shkupi. Li havis de ŝi kvin filinojn: Mara-n, Vljaka-n, Angjelina-n, Jella-n kaj Mamica-n, kaj kvar filojn: Stanisha-n, Reposhi-n, Kostandini-n kaj Georgon, poste nomatan Skanderbeg.



La princlando de Kastriotoj, la emblemo kaj la stampilo de Skanderbeg

La kvar filinojn edzigis Johano Kastrioti kun la federitaj princoj: Mara-n kun Stefano Ĉernoviĉi, princo de Montenegro; Vlajka-n kun Gjin Muzaka; Angjelina-n kun Vladan Arianit Komnen Golemi, princo de Ĉermenika; Jella-n kun Paŭlo Stres Balsha, princo de la regiono inter Kruja kaj Leshi. Mamica edziniĝis kun Muzak Thopija, post kiam Skanderbeg revenis Albanujon. La fortikaĵoj de Johano Kastrioti estis: Kruja, la ĉefurbo de lia princlando, Petrela, proksime de Tirana, Petralba kaj Stelluzi en Mati kaj Sfetigrado en la regiono de supra Dibra.



Mamica Kastrioti

La milito inter Johano Kastrioti kaj la turkoj daŭris de 1407 ĝis 1430 kaj ŝajnas, ke Johano estis venkita almenaŭ trifoje de la turkoj kaj trifoje estis devigita paciĝi sub kondiĉoj malfacilaj; ŝajnas ankaŭ, ke li ribelis, kiam li estis akirinta iom da forto. Oni ne scias detale, kiaj estis la kondiĉoj de tiuj tri pacoj, sed ili proksimume estis jenaj:

1-e, Johano Kastrioti devis cedi la kvar filojn kiel garantiaĵon de sia fideleco kaj la sultano siaparte promesis, ke ili estos liberlasitaj, kiam Johano mortos, por okupi la tronon de princlando lia;

2-e, rezigni la tutan fortikaĵon de Sfetigrado;

3-e, doni la supran kaj malsupran Dibra-n, du regionojn norde de la lago de Ohri kun kelkaj privilegioj por la loĝantoj;

4-e, ofensiva kaj difensiva alianco, laŭ kiu Johano Kastrioti estis devigata sendi al la sultano armeon pri kia ajn milito, kiun li estus havonta kun la najbaroj;

5-e, agnoski la sultanon kiel ĉefsinjoron kaj pagi al li tributon.

Egalan sorton suferis la malsupra Albanujo, kie la dinastio Komnen Thopija estis devigita sin submeti al la sultano sub similaj malfacilaj kondiĉoj.

Inter la jaroj 1431- 1433 Ali Paŝao Evrenoz, uzante Kruja-n kiel bazon, dezertigis Albanujon de Shkodra ĝis Vlora. Unu jaron poste li forprenis Gjirokastra-n al princoj Zenevis. Laŭŝajne, la sorto de Albanujo estis decidita en tiu jaro, t. e. en 1434: preskaŭ la tuta Albanujo estis subpremita de la turkoj, krom kelkaj regionoj ĉe la marbordo, kiujn tenis Venecio. Laŭ la ŝajno, ĉar la realeco estis alia: la albanoj sub la ŝajna kvieteco kaŝis sian ribelspiriton kaj atendis sole la estron por ekkapti la armilojn, forpeli la fremdulojn barbarajn kaj reatingi la perditan liberecon.

La malsupra Albanujo donis signalon al la ribelo. Arianit Komneni, vokita de la siaj, kiuj sendis al li sciigon, ke la homoj estas pretaj por la ribelo, foriris el Adrianopolis, kie li estis internigita de la sultano, revenis en sian patrujon kaj igis sin ĉefo de la ribela militistaro kontraŭ Turkujo. Ali Paŝao Evrenoz estis komandanto de granda armeo turka, kiu marŝis kontraŭ la ribeluloj, sed li estis plene venkita de ili. Arianit Komneni gajnis pro tia venko grandan famon, sciigante Eŭropon, ke ekzistas kristana armeo, kiu povis venki la turkojn.

Post tiu venko la tuta malsupra Albanujo ekrevolucii. Ie oni sukcesis kaj malsukcesis, ĉar la diversaj princoj ne havis interakordon kaj ĉiu militis aparte. Por okazigi la unuiĝon de la fortoj, oni bezonis homon, kaj tia homo ne prokrastis aperi. Tiu estis Skanderbeg.



Skanderbeg dum la batalo- pentraĵo

#### Anekdotoj

Okazis terura afero -- kuras skota sinjorino al la edzo. -- Nia fileto glutis unupencan moneron.



-- Ne gravas -- venas la respondo de la edzo --, ja li havos morgau naskightagon.

Du knabetoj interparolas:

-- Mia patro estas vera bonulo! -- fanfaronas la unua.

-- Chu tion vi diras al mi? -- replikas la alia -- Antau nur du jaroj li estis mia patro.

--

En la Universitato estas periodo de rigoraj ekzamenoj. La Sinjoro Profesoro alparolas iun tre malbone preparitan junulon:

-- Vidu, mi petas, Aleksandro la Granda en via agho jam konkeris la mondon!

-- Jes ja, sed lia profesoro estis Aristotelo mem.

Turisto en Parizo volas volas vidi la Eiffel-turon.

-- En la dua strato maldekstren -- klarigas lokulo al li -- kaj dekstren, poste rekte, kuraghe kaj ne flankighante, kaj baldau vi ekvidos ghin... Vi neniel povas mistrafi ghin, ja ghi estas tuj apud la vendisto de varmaj kolbasetoj.

- Sinjoro vi havos teruran tortur-morton. Vi estos buchita per longklinga tranchilo, senhararigita per flamoj, vi estos distranchita, dishaketita...

-Sinjorino, atendu momenton, mi deprenos la prokoledajn gantojn...

-- Pardonu min sinjoro, chu vi povus diri la ghustan tempon?

-- Estas la kvara horo kaj dudek du minutoj.

-- Estas strange, mi demandadas la homojn jam tuttage, kaj ili chiam diras ion malsaman.

La salongardisto entuziasme klarigas en la muzeo:

-- Kaj jen estas mumio de dek ses-jara faraonidino, kaj ghi estas jam trimil-jara!

-- Pardonu min! -- ekvochas iu el la vizitanta grupo --, chu tiuj trimil jaroj enhavas jam ankau la dek ses?

Nia leganto Teddy alvokis la atenton pri interesa figuro, kiu volas daure mencii fremdajn vortojn por montri sian instruitecon, kaj evidente chio chiam estis fushita. Ni vidu la historion!

Foje vivis iu damo Malvin -- kiu shatis uzi fremdajn vortojn --, sed shi preskau neniam sukcesis kapti la konvenan.

Foje ion demandis iu de shi -- shi devus respondi, ke shi ech la plej palan ideon ne havas. Nu kaj kion shi respondis? -- Mi havas ech ne la plej palan idioton pri tio. -- Ekde tiam shi estis nomata "Pala Idioto".

Alifojе shi parolis pri surstrata demonstracio --, sed che Malvin tio ighis "de'menstruado".  
Fine shi volis protesti kontrau io, do shi deklaris:

-- Mi prostituas!

En la malfrusomera krepusko:

-- Pardonu min Sinjoro! Chu vi ne vidis hazarde policiston en la proksimo?

-- Ne.

-- Do, tiel rapide levu la manojn!

Gufo pendas kap-al-tere sur brancho. Ghin preterflugas du paseroj:

-- Kian problemon ghi havas?

-- Lasu la povrulon, se mi bone vidas, li havas gravan perturbon en idente

Panjo, chu vi memoras, kiom da energio forrabis de vi, ke vi devis oferi tiom da zorgoj pro tiu granda plankovazo?

-- Evidente mi memoras, kara fileto!

-- Nu, mi mencias la aferon nur tial, char ekde hodiau vi ne plu havos tiun zorgon.

En gastejeto malregistrighas gasto. La akceptisto interesighas che li:

-- Bonan matenon! Kiel vi fartis chi tie?

-- Terure -- respondas la ulo. -- Apenau mi dormis iom. En chiuj 15 minutoj mi vekighis abrupte, char io bruegis.

Baldau venas juna paro , la dungito alparolas ankau ilin:

-- Bonan matenon! Mi esperas, ke vi ambau sukcesis satripozi che ni!

-- Badaurinde ne -- respondas la junulo. -- Iu en la najbara chambro ronkis tiel senindulge, ke ni devis frapeti al li la vandon en chiu kvaronhoro, por ke li chesu.

(Ĉiujn anekdotoj sendis s-ro Imre Szabo)